

1986 januaro

79a jaro

n-ro 961 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Esperanto

V-4252/79 (1986)



UEA ĉe
Unesko

**Eksperta konferenco
pri "Plurlingveco kaj
komunikado"**



Vi trovos

en la malverŝajna okazo se vi ne jam sciis, ke ĉi tiu jaro estas la lasta antaŭ la centjariĝo de la Internacia Lingvo. Ni provos regule trakti la preparojn por la Jubileo dum la nuna jaro, kiu estas ankaŭ Internacia Jaro de Paco – montrante, ke la homo ne ĉesas revii kaj esperi. Tio denove memorigas pri la vortoj de Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento: "Al homoj, kiuj diras, ke Esperanto estas nur centjara revo, mi respondas, ke la revo pri paco estas pli ol miljara, kaj ni ja ne ĉesas revii pri tio." Kiom da revo kaj kiom da realo en 1986?

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: Elokventa konfirmo de nia strategio (Grégoire Maertens)
- 2 Teknika estrara kunveno: La Estraro ŝparas... (Osmo Buller); Egala pliklerigo por polaj Esperanto-instruistoj
- 3 Eksteraj rilatoj: UEA ĉe Unesko: Plurlingveco kaj komunikado (François Lo Jacomo)
- 4 Landa agado: Komisiito de UEA vizitis Bolivion (A. Rousset)
- 6 Internacia Jaro de Paco: Poemu pri paco!; Kulturo: Tria Pariza Festivalo superis la antaŭajn (D. Luez)
- 8 Reagoj: Perfekta! (Scott Smith); Dank' al la literaturo (L.H. Knoedt); "Pleje atendata" (N. Laanoja); "Pli movade ol bele-tre" (G. Pirlot); Afriko serĉas ĝemelojn
- 9 Instruado: Novaj evoluoj de la Zagreba Metodo (Zlatko Tišljar)
- 10 Kalendaro: Renkontiĝoj, kongresoj, seminarioj, kursoj ktp.
- 11 Recenzoj: *Lasu min paroli plu!* de Claude Piron (R. Lloancy); *Lineamenti di lessicografia dell' esperanto* de Pietro Rizzo kaj *Vocabolario esperanto-italiano* de Umberto Broccatelli (D.B. Gregor); *Vespero jam fariĝis*; *Agregaĵoj kaj robajoj* de R. Schulze (J. Camacho); *Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj* de Sylla Chaves (G. King); *Kontrastoj* de Carmel Mallia (Sibayama Zyuníti); *Geiriadur Esperanto/kimra vortaro* de J.C. Wells (J. Edwards); *Mia vivo* (P.V. Ranganayakulu)
- 14 TEJO-paĝo: Antaŭ la 42a IJK: Kulturbildo pri Israelo (J. Šemer)
- 15 Trejniĝu en Varsovio
- 16 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 17 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 18 Nekrologoj
- 19 Anoncetoj
- 20 Esperanto en radio

La kovrilo

montras tri scenojn el grava konferenco pri lingvaj aspektoj de la komunikado, aranĝita de UEA ĉe Unesko en Parizo. Supre (de maldekstre): Michel Duc Goninaz, Ronan Tremel, Ahmed Moatas-sime, interpretisto, Paul Garvin, Barbara Despiney, François Lo Jacomo, Tanaka Katuhiko. Malsupre dekstre (de dekstre): Helmar Frank, Martin Haase (malantaŭe), Y.J.D. Peeters, Lachman Khubchandani, interpretistino. Malsupre maldekstre (de dekstre): Moatassime, Tremel, Duc Goninaz. Pli sur paĝo 3... (Fotis Stefan Mac-Gill.)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tōkyō, 153 Japanio; ☎ (03) 770 64 86.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 42 37 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Elokventa konfirmo de nia strategio

Ĝustatempe por mondscale substreki la gravecon de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo, Universala Esperanto-Asocio atingis novan grandan rekonon ĉe Unesko: la 23a sesio de la Ĝenerala Konferenco de tiu monda organizaĵo akceptis komence de novembro en Sofio la Rezolucion 218 pri la tutmonda festado de la Centjara Jubileo de Esperanto. Tiu nova Rezolucio, pri kiu la membroj de UEA povis abunde legi en la decembra numero de la revuo *Esperanto*, ne nur rekonas la grandan progreson, kiun la Internacia Lingvo faris de post 1954 (jaro de la unua Unesko-rezolucio pri Esperanto), sed ĝi diras multe pli ol tion. Ĝi atentigas pri la granda potencialo de Esperanto por la edukado al internacia kompreniĝo kaj proksimiĝo de la homoj kaj popoloj, kaj ĝi per sia rekta invito al ŝtatoj-membroj kaj neregistaraj organizaĵoj kreas vastan politikan bazon por grandskalaj jubileaj aranĝoj tutmonde.

Mi tute aparte kontentas, ke la Rezolucio rekonas la progreson, kiun Esperanto faris rilate sian tutmondigon – "penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj" –, ĉar ĝuste tio estis la ĉefaj priokupoj de UEA tra la pasinta jardeko. La sama strategio devas resti valida ne nur



Delegitoj de Pollando kaj Bulgario, kiuj kun kvin aliaj landoj proponis la Rezolucion 218 de Unesko.

por UEA, sed por la tuta Esperanto-movado ankaŭ dum la venonta jardeko, ĉar la nova Rezolucio elokvente konfirmas la ĝustecon de la elektita vojo.

Kvankam UEA formale enkasigas la ĉefajn meritojn pro la nova rekono de Unesko, la tuta esperantistaro, ĉiuj landaj kaj fakaj organizaĵoj, kontribuis al tiu nova sukceso. La intimaj rilatoj, kiujn UEA jam de multaj jaroj flegas kun Unesko kaj ĝiaj ĉefaj funkciuloj, la engaĝiĝo de nia Asocio en la laboroj de Unesko – ĉio tio restus apenaŭ pli ol formalajo, se similajn rilatojn je la landa nivelo ne flegus niaj asocioj en Belgio, Bulgario, Ĉinio, Japanio, Jugoslavio, Pollando ktp. La jugoslava delegacio en la Ĝenerala Konferenco ne estus proponinta la Rezolucion sen la granda laboro, kiun la esperantistaĵo de tiu lando faras por disvastigi la Internacian Lingvon. Ankaŭ la ĉina delegacio ne estus subteninta la rezolucipropozicion sen la agado de Ĉina Esperanto-Ligo.

Se la Rezolucio estas nia komuna atingo, ĝi nun des pli fariĝas nia komuna tasko, ĉar ĝi fine havas nur tiom da graveco, kiom ni sukcesos doni al ĝi. Tiu dokumento estas nur la konvena ponto por aliri la registarajn kaj internaciajn organizaĵojn, partoprenigi ilin en la Jubileo kaj tiel atingi novajn, pli praktikajn, pli realajn sukcesojn kaj rekonojn al la Internacia Lingvo.

Ni ĉiuj certe konscias, ke nia tuta antaŭjubilea agado ne celas la Jubileon mem, sed la sorton de la Internacia Lingvo post la Centjara Jubileo. Al tia pensado aliĝas ankaŭ la Rezolucio mem, ĉar ĝi invitas la ŝtatojn-membrojn "instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado". La tuta Esperanto-komunumo devas kompreni, ke Unesko direktas tiun inviton ankaŭ al ĝi.

Komence de la nova jaro 1986 ni do staras antaŭ novaj taskoj kaj ne malpli da laboro ol ni havis tra la tuta centjara historio de Esperanto. La Jubileo estas proksima, sed la venko de la Internacia Lingvo ankoraŭ restas en fora estonteco. Feliĉe, tiu estonteco fariĝas ĉiam pli proksima, kion bele emfazas ankaŭ la nova Rezolucio.

Ni laboru kaj esperu! Zamenhof mem signis al ni la vojon en sia samnoma poemo: *L'espero, l'obstino, kaj la pacienco – / jen estas la signoj, per kies potenco / ni paŝo post paŝo, post longa laboro, / atingos la celon en gloro.*

Nia komuna laboro en 1986 karakteriziĝu per tiuj zamenhofaj *obstino* kaj *pacienco*, per organiziteco kaj kontinueco, kaj ĝi certe proksimigos nin al nia komuna celo!

Grégoire Maertens,
Prezidanto de UEA

La Estraro ŝparas...

La konferencejo en la nova alo de la Centra Oficejo estas uzata jam de oktobro, sed veran malfermon ĝi spertis antaŭ la jarfino. Nome, la 20an kaj 21an de decembro laboris tie kvar estraranoj de UEA: Grégoire Maertens, Umeda Yosimi, Renato Corsetti kaj Flóra Szabó-Felső. Pri tia kunsido de nur kelkaj membroj la Estraro decidis en Aŭgsburgo. La ceteraj estraranoj voĉdonos poste pri la decidoj de la kvaropo.

Nun la leganto eble demandas, ĉu la rekonstruado de la movada ĉefsidejo jam pretas. Pli-malpli jes. La libroservo komencis la novan jaron en vasta, konvene ekipita ĉambro. Ekrigardo tra ĝia montrofenestro donas al ĉiu preterpasanto impreson pri ampleksa literatura kulturo de Esperanto. Oficiala inaŭguro de la domo okazos en aprilo, kun reprezentantoj de la urbo, de esperantistaj kaj aliaj kulturaj organizaĵoj.

Multan tempon oni dediĉis al financaj aferoj. Pro la granda negativa saldo en 1984, oni rigore ŝparis dum 1985 ĉe kostoj. Tio tuŝis precipe salajrojn, spite ke tio neeviteble premis la stabon de la Centra Oficejo. Tiu stabo malkreskis, dum kreskis la taskoj.

Post ĉiuj ŝparoj, estis malagrabla al la Estraro ree fronti grandan minuson pro nerealiĝo de buĝetitaj rimedoj. Tamen, pro donacoj kaj heredaĵoj la antaŭvidebla negativa saldo en la spezokonto fakte ne grave rolas en la ĝenerala financa progreso de la Asocio.

Egala pliklerigado por polaj Eo-instruistoj

La unuan fojon en la historio de la Esperantomovado en Pollando, la 19a Tutpollanda Kurso-Konferenco de Esperanto-Instruistoj kaj Esperanto-Kursgvidantoj estis organizita laŭ la centraj didaktikaj planoj de ŝtata kleriga instanco, nome de Centra Klerig-Instituto por Instruistoj (IKN) en Varsovio. Tion sukcese proponis s-ino Irena Szanser, prezidanto de la Pedagogia Komisiono de Pola Esperanto-Asocio. Ŝi poste gvidis la organizon de la konferenco, kie la ĝenerala pliklerigo de Esperanto-instruistoj en Pollando komencis esti oficiale traktata egale al tiu de instruistoj de aliaj fremdaj lingvoj.

La konferenco okazis de la 25a ĝis la 27a de oktobro en Kalisz kun la ĉeesto de 95 personoj. Partopreno en la programo de lekcioj, diskutoj kaj modellecionoj estis senpaga por ĉiu, kiu instruas la Internacian Lingvon en la ŝtata kleriga sistemo.

Bonan novaĵon prezentis la membrostatistiko. Novembre la individua membraro superis la finan rezulton de 1984 jam per 250 kaj poste enfluis ja pliaj aliĝoj. Sekve, sojle al la Jubilea Jaro, la movado konscias la neceson fortikigi sian organizitecon. Tiu fenomeno espereble daŭros en 1986, des pli, ke eksperimente ekfunkcias la kategorio Membro kun Gvidlibro. Tion instigas ankaŭ la nova rekono de Unesko al UEA.

En Aŭgsburgo la Estraro konkludis, ke Scienca Eldona Centro devas esti restrukturita. Anstataŭ ligiĝi al unu loko, kiel ĝis nun, la aktivado de SEC disvolviĝos plurloke sub kunordigo de la Centra Oficejo. Eĉ dum la transiro la eldonado tamen povas daŭri sen interrompo. La sekva titolo, *Vetero kaj klimato de la mondo*, aperos en la unua duono de 1986.

Terminologia laboro ricevos organizajn kadrojn. La Komitata decido starigi Terminologian Esperanto-Centron rapide efektiviĝas. La Estraro nomis s-inon Wera Dehler komisiito pri TEC – mallongigo, kiu evidente fariĝos same konata kiel CED, kun kiu TEC havos similan statuson en UEA. Por ke ĉiu, kiu konscias la gravecon de la nova institucio, povu subteni ĝin, estis starigita Fondaĵo Wüster. Tiel oni honoras Eugen Wüster, la fondinton de la terminologia laboro en Esperanto.

UEA tamen eldonos ne nur sciencaĵojn. 1986 estas Internacia Jaro de Paco, okaze de kiu aperos volumo de originalaj pacpoemoj (vd. aliloke en ĉi tiu numero). Krome, oni decidis reeldoni la klasikan traktaĵon *Al eterna paco* de la filozofo Immanuel Kant (1724-1804), en la traduko de Paul Christaller.

La Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto* intertempe riĉiĝis per nova eldono de *Plena analiza gramatiko*. Sekvos antologio de originala prozo, nun redaktata de R. Rossetti kaj H. Vatré. Manuskriptoj de novaj notoj de G. Waringhien por represo de *Fundamenta krestomatia* kaj *Nova Esperanta krestomatia* de W. Auld jam pretas. Nova *Enciklopedio de Esperanto* estas redaktata. La Estraro traktis ankaŭ envicigo de aliaj ĉefverkoj en la Kolekton, pri kio vi legos poste.

Por la Jubileo, William Auld verkis bazan informlibron *La fenomeno Esperanto*, kiu aperos, krom en Esperanto, en nacilingvaj tradukoj. Jam deko da interesitaj landaj asocioj ricevis la manuskripton por traduki kaj eldonigi ĝin. En preskaŭ prespreta stadio estas alia tradukinda informlibro: *Esperanto: lingvo – literaturo – movado* de Pierre Janton.

Pluraj aliaj jubileaj projektoj estis traktataj. Ĉar ni revenos al ili en sekvaj numeroj, ne necesas nun eniri detalojn. La Estraro povis konstati, ke ĝenerale oni aktive prepariĝas por inda akcepto de la Jubileo. Jam nun videblas, ke la sofia rezolucio de Unesko forte spronas tiun prepariĝon, same kiel informpetojn de oficialaj instancoj el landoj, ĝis nun ne troveblaj sur la mapo de Esperantujo.

Osmo Buller

UEA ĉe Unesko: Plurlingveco kaj komunikado

Esperantistoj ja memoras la viziton de Amadou Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de Unesko, al nia 62a Universala Kongreso en Rejkjaviko (Islando) fine de julio 1977. En tiu momento naskiĝis la propono, kiun Humphrey Tonkin formale prezentis en majo 1982, organizi en Unesko mem kunvenon de specialistoj pri plurlingveco kaj komunikado. La proponon ŝatis Unesko, kaj post ambaŭflankaj prokrastoj la kunveno fine okazis inter la 25a kaj la 27a de novembro.

La aranĝo hazarde troviĝis tuj post la akcepto de la rezolucio pri Esperanto fare de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Sofio la 8an de novembro (vd. *Esperanto*, p.203/1985), kaj ambaŭ sukcesoj atestas la bonan reputacion akiritan de UEA en kelkaj sektoroj de Unesko (la kunvenon subvenciis la sektoro pri komunikado) kaj ĉe iuj ŝtatoj-membroj (la rezolucio proponis Jugoslavio) post dekjara funkciado de nia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj. Kvankam tro

granda parto de nia kunveno organiziĝis nur lastminute, la partoprenantoj (kaj interalie la reprezentanto de Unesko) montriĝis kontentaj pri la aranĝo, kiu espereble inaŭguris novan specon de rilatoj kun ĉi tiu organizo.

La kunveno ne celis prezenti Esperanton kiel solvon de la monda lingvo-problemo, sed nur atentigi Uneskon pri la ekzisto de tiu problemo. Ĝenerale la problemoj rezultantaj el plurlingveco estas preteratentataj de la koncernaj instancoj, kvankam unu el niaj invititoj, Mustapha Masmoudi (Tunizio), jam aludis ilin en la komisiono McBride, en kiu li membris.

Venis 21 prelegantoj el deko da landoj, kaj pli ol sepdek homoj ĉeestis almenaŭ parton de la kunveno. En la kvindek-loka salono sidis meze trideko da partoprenantoj, sed nur deko el ili (ĉefe la prelegantoj) partoprenis la debaton. La laborlingvoj estis la franca kaj angla (la franca pli ofte ol la angla), kaj studentoj pri interpretado, afable kaj senpage, flustre interpretis por unu aŭ du el la gastoj, kompensante la mankon de samtempa interpretado pro troa kosto. Kelkaj invititoj venis el foraj landoj: Tanaka Katuhiko el Japanio, Lachman Khubchandani el Hinda Unio.

Fotis: S. MacGill



De maldekstre: Ronan Tremel (Univ. de Parizo 8), prof. Ahmed Moatassime (Univ. de Parizo 1), interpretisto, prof. Paul Garvin (Univ. de Novjorko/Buffalo), Barbara Despiney (estrarano de UEA), François Lo Jacomo, prof. Tanaka Katuhiko (Univ. Hitsobasi, Tokio).

Mustapha Masmoudi el Tunizio, Paul Garvin kaj Humphrey Tonkin el Usono, aliaj el Parizo (André Martinet, Jean-Pierre Van Deth, Claude Hagège, Jean-René Ladmiral, Ahmed Moatassime, Emmanuel Companys kaj Louis-Jean Calvet) aŭ de proksima Eŭropo (Helmar Frank el FR Germanio, Michel Duc Goninaz el suda Francio, Brian Moon el Luksemburgo, Yvo Peeters, Jean Humblet kaj François Xavier Nève, ĉiuj tri el Belgio) k.a. La plimulto de la partoprenantoj ne estis esperantistoj.

La prelegantoj prezentis diversajn modelojn por administri la plurlingvecon, surbaze de ekzistantaj situacioj (Francio, Hinda Unio, Belgio, Magrebo, Kanado ktp.) Ili atentigis, ke plurlingveco estas kultura riĉeco, kies avantaĝoj ĝenerale superas la malavantaĝojn. Cetere plurlingveco povas signifi aŭ plurajn lingvojn sur la sama teritorio, aŭ individuan plurlingvecon, kaj ĉi tiu lasta fenomeno estas pli ofta ol oni ĝenerale supozas. Krome, lingvo ne estas nur komunikilo, sed ankaŭ parto de individua aŭ kolektiva identeco. En plurlingvaj situacioj, kiam montriĝas la bezono komuniki, aŭtomate kreiĝas la solvoj, sed pri kia bezono de kia komunikado temas? Ĉu, post la angla lingvo, la hispana ludas pli gravan rolon kiel monda lingvo ol la franca? Ĉu plurlingveco nepre signifas, ke ekzemple araboj lernu la francan, aŭ ankaŭ, ke francoj lernu la araban? Ĉu la kostoj de tradukado kaj interpretado estas troaj kompare kun,



Prelegas prof. Ahmed Moatassime de "IEDES", Universitato de Parizo, pri plurlingvismo kaj komunikado en Magrebo.

ekzemple, la kostoj de reklamado? Ĉu la teknologia estonteco, koncerne plurlingvecon kaj lingvan manipuladon, estas timinda aŭ esperinda?

Dek ok horoj ne sufiĉis por solvi ĉiujn ĉi problemojn, tamen dum la lasta horo ni atingis kelkajn konkludojn. Aperos preciza raporto pri la kunveno, kaj surbaze de ĝi Unesko pristudos, ĉu kelkaj proponoj niaj kongruas kun la ĝenerala agadplano de unu aŭ alia el ĝiaj sektoroj. Tiukaze, ni rajtas esperi novan

subvencion por plua agado dum la tuj venontaj jaroj. Ĝenerala propono de la partoprenantoj estis, ke Unesko pli konsideru la lingvan dimension en ĉiuj jam funkciantaj agadoj, kio ne malhelpos specifajn agadplanojn pri plurlingveco, ekzemple kreadon de informbanko pri ĉi tiu temo.

Kvankam Unesko nun trairas krizan periodon, niaj hodiaŭaj sukcesoj ĉe tiu organizo povos altiri la atenton de ĝiaj ŝtatoj-membroj al la agado de UEA, kaj tiel helpi al la informa agado de niaj landaj asocioj. Tiucele estas jam decidite eldoni sintezan raporton pri la kunveno (surbaze de kompleta surbendigo de la kontribuoj kaj debatoj) en formo de *Esperanto-dokumento* antaŭ la venonta Universala Kongreso.

François Lo Jacomo

LANDA AGADO

Komisiito de UEA vizitis Bolivion

Kiel diplomito pri komercaj sciencoj de la pariza Universitato HEC, 24-jara Alexandre Rousset utilisian devon plenumi praktikan staĝon kiel eron de siaj normalaj studoj, por volontule helpi al Esperanto kaj UEA en la sudamerika lando Bolivio. El siaj spertoj en tiu evolulando en Anda Montaro, li eltiras konkludojn, kiuj eventuale validas por aliaj aktivuloj aŭ por personoj, kiuj ankoraŭ ne kuraĝis ekaktivi en simila medio.

Bolivio estas lando de miliono cent mil kvadrataj kilometroj kun loĝantaro de proksimume ses milionoj. Ĝiaj plej uzataj lingvoj estas la hispana, keĉua kaj ajmara. Bolivio ne posedas marbordon, sed ĝia administra ĉefurbo, La Paz, 3 694 metrojn super la marnivelo, estas la plej alte situanta en la mondo. Bolivio estas lando de altegaj montoj, riveregoj kaj densaj ĝangaloj. Por enspezi eksterlandan valonon plej gravas minado, sed por la enlanda ekonomio ĉefrolas la terkulturado.

Post sia alveno en La Paz, Alexandre Rousset kontaktis la (solan) delegiton de UEA en Bolivio, d-ro José Roberto Arze, kiu ekde 1976 vekis iom da intereso en intelektaj rondoj per publikigo de pluraj artikoloj, ĉefe en *Presencia literaria*, la gvida literatura gazeto de la lando.

Vizitante redakciojn de lokaj revuoj kaj ĵurnaloj, Arze kaj Rousset renkontis preskaŭ senescepte pozitivan sintenon al la Internacia Lingvo. La ĵurnaloj *Presencia* (70 mil ekzempleroj) kaj *Hoy* (15 mil ekzempleroj) promesis regule publikigi materialojn pri la lingvo kaj movado. La 13an de decembro aperis en *Presencia* ĝenerala artikolo pri Esperanto, verkita de

d-ro Arze, kaj venonta numero de la revuo *Perspektivas* publikigos plian informan artikolon.

Universitata Televido de La Paz intervjuis Rousset kaj konsentis elsendi kurson de Esperanto, kiu eble interrilatos kun tekstoj aperontaj en la porjunlara sekcio de *Presencia*. Ankaŭ Radio Cristal, stacio aŭskultata precipe de intelektuloj, post sia intervjuo kun Rousset esprimis pretecon elsendi notojn pri Esperanto en kulturaj programoj.

La plej gravaj kontaktoj rilatis al Universitato de La Paz, kie aro da gestudentoj de Bibliotekologia Ins-



La Paz: Statuo de la indiana heroo Ekeko, pri kiu aperis broŝuro en Esperanto: Rakonto pri Ekeko

tituto – kie instruas d-ro Arze – organiziĝis por partopreni Esperanto-kurson. Ĝin gvidos d-ro Arze dum la unua kvarono de 1986. Krome okazis renkontiĝo kun la direktoro de Lingvistika Instituto, kie grupo da instruistoj kaj lernantoj interparolis kun Rousset.

Alia grava kontakto okazis kun Kulturdomo "Franz Tamayo", subtenata de la magistrato, kie en februaro okazos ekspozicio pri Esperanto. Por tiu ekspozicio UEA jam sendis materialon debete al la Propaganda Konto. Franz Tamayo (1879-1956) estis grava poeto, verkisto kaj pensisto de Bolivio. Lia poemo "Skerco de l' arbaro" aperas Esperante en *La homo sur sia vojo* (1966) de M. Fernández Menéndez.

Fine, okazis renkontiĝo kun la estraro de Bolivia Verkista Societo. Ĝi entuziasme akceptis la proponon eldoni bolivian antologion en Esperanto kiel kontribuon al la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo. La necesajn financajn rimedojn klopodos trovi la Societo, kvankam ĝi mem ne estas riĉa. Ĝi volonte akceptas proponojn pri kunfinancado de la eble cent-paĝa antologio, por kiu laboros d-ro Arze kaj espereble aliaj sudamerikaj kompetentuloj.

Oni povas demandi, kial ĉi tio ne jam povis okazi sen la alveno de Rousset. La respondo estas, ke lia vizito ne simple instigis al plia informa agado, sed per ĝi eblis konkrete pruvi al eventualaj skeptikuloj, ke

Esperanto ne estas fantaziaĵo, sed fakte ekzistas kaj funkcias en la praktiko.

En la suba artikolo Alexandre Rousset donas proprajn impresojn pri sia vizito.

Pri ĉiuj el niaj klopodoj disvastigi Esperanton en Bolivio, ni povas formi ĝeneralan regulon: ne necesas multe da esperantistoj en la lando por atingi notindan rezulton. Fakte, nia duopo, d-ro José Arze kaj mi, miaopinie, funkciis tute bone en preskaŭ ĉiuj cirkonstancoj, kvankam mi mem antaŭe ne konsciis pri multaj specifaj trajtoj de la elektita lando.

Kompreneble, la delegito devas jam havi kelkajn kontaktojn en la naciaj amaskomunikiloj kaj en intelektulaj medioj. Tial, li aŭ ŝi prefere povu labori intelekte kaj loĝu en unu el la plej grandaj urboj de la lando, por faciligi tiujn kontaktojn. Pripensinte niajn komunajn sukcesojn, mi deduktas, ke komisiito en simila situacio prefere venu el iom malproksima lando, por ŝajni iom mistera, kaj estu vere interesita pri la lando kaj ties kulturo.

La kontaktoj, aranĝendaj de la delegito, povas esti starigitaj surbaze de la "evento" de la alveno mem de la eksterlanda komisiito. Povas esti pli taŭge, se la komisiito havas respektindan aĝon (kion mi ne havis). Tiurilate utilas, ke ĉiuj esperantistoj, vojaĝantaj eĉ nelonge en landoj, kie ankoraŭ ne plenkreskis la loka movado, kontaktu la lokajn delegitojn kaj provu apliki similan procedon cele al la naciaj amaskomunikiloj.

Preparinte artikolon aŭ intervjuon, ambaŭ personoj povas informi ĵurnalistojn (serĉante ĉiufoje la plej altrangajn en la vizitata gazeto). Ili ofte kontentiĝos, ricevinte jam redaktitan materialon. Sed renkontiĝoj povas profite koncerni aliajn kulturajn instancojn (ankaŭ nacinivelajn), depende de la propraj kondiĉoj de la delegito, por okazigi prelegojn pri Esperanto. Se okazas interpretado, ĝi tamen devas esti kompetenta.

Ĉiuokaze, la idealo estas havigi rubrikon relative regulan, ĉu en gazeto, ĉu en radio aŭ televido. Tion antaŭiras, kompreneble, la kondiĉo, ke la delegito aŭ iu alia pretu daŭre prizorgi ĝin.

Informa kampanjo ĝustatempe kapablas trafi favore al Esperanto, kondiĉe ke ĝi uzas la lokajn redakciajn teknikojn. Ne ĉiuj gazetoj disponas pri la sama sistemo kiel ekzemple en okcidenta Eŭropo, de kie mi venis. Rubrikoj kaj kronikoj estas la plej adekvataj rimedoj en multaj landoj, kiel ankaŭ en Bolivio.

Mia komisiio al Bolivio verŝajne estis reala sukceso precipe dank' al la neanstataŭebla rolo de d-ro Arze, al liaj eminentaj kondiĉoj kaj al lia prestiĝo inter liaj studentoj en la fako de bibliotekologio, kie li instruas. El ili eble kreiĝos la unua Esperanta kerno en tiu lando. Sed mi rimarkis ankaŭ seriozan interesigon pri la fenomeno Esperanto ne nur ĉe gejunuloj, sed

krome ĉe multaj ĵurnalistoj kaj eminentuloj. Kompreneble, la Internacia Lingvo ne estas urĝa bezono por ĉiuj bolivianoj, kiuj rilatas profesie aŭ persone plej ofte nur kun aliaj sudamerikanoj. Sed tamen ofte viglas la deziro ekscii iom pli pri tiu lingva fakto, tiel longe kaŝita al ili. Ilia scivolemo pri Esperanto ŝajnis al mi simili al tiu pri kulturo, kiun oni povas trovi ĉe analfabetaj popoloj. En la nuntempa stato de Esperanto ekzistas ankoraŭ multaj tiaj "analfabetoj" ankaŭ ekster evolulandoj.

Alexandre Rousset

INTERNACIA JARO DE PACO

Poemu pri paco!

Por efektiviĝi unu el la komitataj rezolucioj koncerne la nunan Internacian Jaron de Paco, la Estraro de UEA invitas la poetojn kaj vers-amantojn kontribui al "Poemaro por paco", kiun UEA planas eldoni meze de 1986, kunlabore i.a. kun Ĉina Esperanto-Eldonejo, unuavice kiel memoraĵon okaze de la 71a Universala Kongreso. La reguloj por kontribuoj estas:

1) La maksimume 48-paĝa libro konsistos el poemoj nur originale verkita en Esperanto, ĉu novaj ĉu jam aperigitaj. Ili devas temi pri "paco", bazita sur la specifa esperantista konvinkiĝo pri paco, senkonsidere pri politikaj aŭ partiaj opinioj.

2) La poeziaj konkursaĵoj por la ĉi-jara unufoja Pacpremio de la Belartaj Konkursoj de UEA (vd. *Esperanto*, p.189/85) aŭtomate validas ankaŭ por la poemaro, kie ĝiaj premiitaj poeziaĵoj aperos.

3) Ĉiu poeto verku aŭ sendu *nur unu pecon* de maksimume 50 versoj.

4) Alsendo de verko signifas aŭtomatan cedon de ĝia kopirajto por la koncerna poemaro. Manuskriptoj ne estos resenditaj. La verkinto de ĉiu aperigita poemo ricevos minimume unu ekzempleron de la libro.

5) Elektos la eldonotajn poemojn tri-persona redakta komitato, kiu konsistas el s-roj Konisi Gaku, Miyamoto Masao kaj Baldur Ragnarsson.

6) Oni sendu la poemojn al la sekretario de la redakta komitato: S-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio, por ke ili atingu lin antaŭ la 31a de marto 1986.



KULTURO

Tria Pariza Festivalo superis la antaŭajn

Por la tria sinsekva jaro okazis en Parizo festivalo de Esperantaj teatraĵoj kaj kanzonado, ĉi-foje dum du posttagmezoj kaj unu vespero de la 23a kaj 24a de novembro.

Teatrotrupo de Germana Esperanto-Junularo prezentis *La kalva kantistino* de Eugène Ionesco; franca aŭtoro rumandevena. La gejunuloj bone ludis tiun malfacilan tekston en ĝia Esperanta versio el la plumo de Georges Lagrange. La tradukinto lerte enmiksas Esperantajn aludojn en la frenezecan frazlaron de la fino. Do, komenco bona, ĉar oni multe ridis, kaj rido estas efika aperitivo en tia festeno.

Poste Stefan MacGill, novzelandano, prezentis "Unuhoma spektaklo", per kiu li tuj kaptis sian publikon, kiu frandis lian spriton, ĉefe en la skeĉo pri maljunuloj, parolantaj pri la epoko de sia junaĝo, kaj en tiu de la mimo... ĉe la radio.

En la dua parto rolis sinsekve kvar francoj. Ĵak Le Puil kantis kun sia jam konata talento. Li aldone prizorgis la organizon de la festivalo.

Krom esti la anoncisto, Jean-Pierre Danvy deklamis poemon de Victor Hugo en bonega propra traduko, omaĝante al tiu giganto de la deknaŭa jarcento, mortinta antaŭ ĝuste cent jaroj.

Venis la vico de Georges Lagrange, kies vervo ridigis la spektantojn, dum li ludis tri amuzajn skeĉojn. Du estis satiroj pri nia moderna mondo, kun ĝiaj parolantaj maŝinoj kaj pri la variaj voĉoj de la gazetaro, kiu diversmaniere komentas banalan okazaĵon.

Kaj la deserton donis al ni la kvara franco, Michel Cavelan, el la malproksima urbo Nico. Post popularaj kantoj el Ĉeĥoslovakio kaj suda Francujo (Okcitanujo), li kantis adaptaĵojn de francaj kantistoj-verkistoj: Georges Brassens, Marie-Paule Belle kaj Boris Vian. Lia bela voĉo alportis al malvarma norda Francujo iom da mediteranea varmo.

Sabatvespere, la nur dupersona (sed kiel talenta!) trupo "La krizalido", konsistanta el Arno Lagrange kaj Solen, ludis du paralelajn teatraĵojn sub la komuna titolo *Geecoĵ iam kaj tiam: La plezuro disiĝi* de Jules Renard kaj *La amanto* de Harold Pinter pri problemoj de geamantoj (geedzoj aŭ ne) en la pasinta jarcento kaj nun. Ŝanĝiĝis la kostumoj kaj mebloj, sed ĉefe la sintenoj de la viroj kaj virinoj, de unu teatraĵo al la alia. La geaktoroj kapable reliefigis tiujn diferencojn. Apartan mencion meritas Arno Lagrange (kiu ankaŭ tradukis ambaŭ verkojn), ĉar li



krome ludis en la dua teatraĵo la du virajn rolojn de la edzo kaj amanto. La diferenco inter ili estis tia, ke oni povus kredi, ke ludas du diversaj aktoroj. La amatoraj aktoroj patro Georges kaj filo Arno Lagrange, ĉe la kulmino de sia talento, certe egalas multajn profesiulojn.

La dua tago komenciĝis per *Cikonioj*, ludita de la dupersona pola trupo Studenta Esperanta Teatro el Zielona Góra. La gejunuloj prezentis interesan verkon, kaj ilia serioza ludado estis gratulinda. Sed la teatraĵo, iom komplika kaj kun ĉiuspecaj simboloj, ne estis tute komprenata de ĉiuj. Bedaŭrinde la teksto ne estis havebla ĉe la libroservo de la festivalo.

Fotis: S. MacGill



Judith Bormann kaj Martin Haase (ĉetable) rolas en la teatraĵo La kalva kantistino de Eugène Ionesco.

Tiu posttagmezo alportis la plej belan programaron de la festivalo, kvankam ĝi ne rekte rilatis al Esperanto: la baletojn kun la trupo de Claudine Tavares. Dek ĉarmaj junulinoj prezentis tre diversajn dancojn, dignan, petolan, klasikan kaj blagan. La beleco de la knabinoj, aldonita al la bunta arto de perfekta dancado, faris al ĉiuj spektantoj grandan impreson, kaj la tondra aplaŭdado pruvis la kontenton de la plimulto.

Alterne kun tiuj plaĉaj dancoj, ni havis la subtilan plezuron aŭdi versojn de William Auld, tiu majstro de nia poezio, deklamatajn de tiu alia majstro, Michel Audibert. Li perfekte interpretis amuzajn versojn de la skota poeto kaj atingis la kulminon de la deklama arto kun la poemo "Ebrio".

La lasta programero de la festivalo kuŝis preskaŭ tute sur la ŝultroj de Hervé Gonin. Unue li legis kaj kantis poemojn de Raymond Schwartz, poste li ludis amuzajn skeĉojn kun mirinda natureco, i.a. "Telefono".

Fine ensceniĝis la skipo de la kabaredo La Ruĝa Kruĉo, kiu pastičis kelkajn erojn de la finiĝanta festivalo. Sendube tiuj pastiĉoj estis amuzaj, ĉar la publiko multe ridis, kaj la rolantoj meritis pro sia tuja improvizado, nepre aplaŭdinda. Sed, se mi dirus, ke tiu "sprito" estis altnivela, oni certe taksus min blaganto.

La 3a Pariza Festivalo absolute superis la du antaŭajn (ĉefe la duan). Bedaŭrinde la salono ne estis plena. Tiurilate ĝi meritis pli grandan sukceson. Espereble venontjare pli multaj homoj venos al Parizo por vidi la 4an festivalon.

Daniel Luez

Perfekta!

Kiel redaktoro de usonaj revuoj, mi volas diri, ke mia opinio *Esperanto* estas "perfekta" – ne ŝanĝu ĝin!

Scott Smith (Usono)

Dank' al la literaturo

Mi estis kaj estas profunde ŝokita de frazo aperinta en via artikolo "Kia estu la estonteco de via revuo?" en la novembra numero (p.181), nome: "Oni kritikis la troan aperigon de prikulturaj artikoloj, kiel ekzemple de recenzoj."

Jam ĝisnaŭze estas dirite kaj pruvite, ke *Esperanto* estas ne nur lingvo, sed ĉefe kultura movado. Ankaŭ, ke nur dank' al la literaturo ĝi fariĝis matura komunikilo, kaj nur pro tio rajtas postuli la rolon de internacia lingvo. Tiuj "onioj", kiuj kritikis la troan

Afriko serĉas ĝemelojn

Abundas lernantoj en Afriko. Sed ne sufiĉe abundas esperantistoj ekster Afriko, kiuj deziras ĝemele ligiĝi kun ili. Estas multaj korespondantoj, sed nura leterinterŝanĝado ne satigas la intereson de la afrikanoj.

Necesas ne nur multaj, sed ankaŭ vere utilaj kaj valorenhavaj rilatoj. La ĝemela sistemo kreskis kaj multaj kontaktoj nun bone funkcias, kvankam povus esti pli, kaj kvante kaj kvalite.

Por elmontri la ekzemplojn kaj kuraĝigi aliajn, la revuo *Esperanto* invitas klubojn kaj unuopulojn, kiuj ĝemele rilatas kun Afriko, sendi koncizan raporton pri siaj spertoj. La informoj estu konkretaj: 1) kun kiuj landoj oni rilatas, 2) kiel ofte, 3) kiel oni servis en ambaŭ direktoj, 4) kiujn valorojn oni spertis, 5) kiujn avertojn oni donus por eviti problemojn, 6) kiuj anekdotoj rakontindas.

La plej informriĉaj raportoj aperos en la revuo, kaj principe ĉiuj aperos en la nova duonjara bulteno de UEA por ĝemelantoj, kiu aperos ĉirkaŭ la 1-a de marto. Do bonvolu baldaŭ reagi al: Revuo *Esperanto*, UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Interesitoj pri ĝemeliĝo aŭ la tiutema bulteno skribu al: H. Bakker, Kastelenstraat 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando.

aperigon de prikulturaj artikoloj, formas senutilan elĵetandan balaston de nia afero. Homoj, kiuj malŝatas kulturajn artikolojn, inter ili recenzojn, evidente ne abonas aliajn kulturajn revuojn kaj ne aĉetas librojn, unu el la gravaj enspezfontoj de UEA kaj de aliaj organizaĵoj.

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

"Pleje atendata"

Inter la deko de *Esperanto*-revuoj ricevataj de mi, pleje mi atendas ĉiun novan numeron de la via. Ordinare ĝi estas legita la saman tagon, en kiu ĝi alvenis. Malmultaj estas la artikoloj, kiujn mi ne legas... Ĉu "novigi" pro nura novigdeziro?

Laŭ mia opinio *Esperanto* estas revuo de movadanoj-aktivuloj, kaj tia ĝi devas ankaŭ resti. Ĝi ne estas distrilo, kaj tio ĝi ne rajtas fariĝi. Eble *Fonto*, *Monato* kaj *Literatura foiro* povas kontentige servi por tio, kvankam akireblaj nur en okcidentaj landoj.

La vivokapablon kaj kulturan nivelon de iu ajn lingvo demonstras ĝia literaturo. Necesas propagandian literaturon. Justa kritiko de la aperintaj libroj estas necesega. Restu por la decido de la redaktoro, kiujn recenzojn redukti aŭ tute ne aperigi.

"Loke – fake – persone" certe restu, laŭeble pli-vastiĝu. Salutindaj estus intervjuoj kun la elstaraj aktivuloj, verkistoj, pri landaj movadoj, gravaj eventoj. Okaze de la baldaŭa Centjara Jubileo salutindas materialoj el la historio de la movado.

N. Laanoja (Sovetunio)

Pli movade ol beletre

Laŭ mi, revuo kiel *Esperanto* estu pli movada ol beletra, sed temas pri ege subjektiva opinio, ĉar, ekzemple, neniam mi legas recenzojn; nur "Laste aperis..." tre interesas min. Pri literaturo ekzistas apartaj revuoj kiel *Fonto* kaj *Literatura foiro*.

Gravas daŭrigi la provon pri rubriko kiel "Kiel aktivi". Ofte rezultoj konstatablas nur post pluraj monatoj.

Por sproni interŝanĝojn de mallonge prezentitaj ideoj, ĉu ne eblas enkonduki rubrikon "Poŝtkarto de la leganto"?

Ĉu ne endas mencii kompletan adreson de aŭtoro? Tiel eblus rekte kontakti la skribinton. [Red. Tion ni jam faras, kondiĉe ke ni havas skriban konsenton de la aŭtoro.]

Germain Pirlot (Belgio)

Novaj evoluoj de la Zagreba Metodo

Post la unuaj internaciaj kursoj laŭ la tiel nomata zagreba instrumetodo en 1984, la aŭtorgrupo en Internacia Kultura Servo de Zagrebo daŭrigis sian eksperimentadon pri la instruado de Esperanto.

En majo 1985 okazis nova internacia kurso kun kursanoj el Graz (Aŭstrio) kaj Rijeka (Jugoslavio). Partoprenis trideko da gelernantoj (dek ses el Graz, inkluzive de kelkaj instruistoj). La kunlaboro kun Graz rezultis per kontaktoj kun Pedagogia Instituto de Stirio, kiu petis permeson de la eduka ministerio de Aŭstrio komenci eksperimentajn kursojn laŭ la Zagreba Metodo, kun instruistoj el Aŭstrio kaj Jugoslavio. La permeso alvenis, kaj ni nun atendas la efektivigon de la unua tia kurso, en kiu la instruistoj de Graz kaj Zagrebo kune lernos Esperanton dum tri tagoj en Zagrebo kaj poste same tri tagojn en Graz. Komence de novembro pasintjare okazis plia internacia kurso en Zagrebo, en kiu kun la zagrebanoj lernis hungaraj gejunuloj el Várpalota. Dum tri tagoj kunestadis kaj kunlernis dek tri jugoslavaj kaj dek tri hungaraj mezlernejanoj, antaŭe lerninte nur du lecionojn el la lernolibro.

Jen kelkaj interesaj konkludoj el la pasintjaraj spertoj:

1) La bonegaj rezultoj de la hungara junulgrupo montris, ke senbazaj estis la iomaj timoj, ke personoj, kies gepatra lingvo forte diferencas de Esperanto, ne kapablos tiel rapide lerni la lingvon. Sufiĉa antaŭpreparo kaj la ĝusta lernmotivo ŝajne garantias sukceson per anoj de iu ajn nacio.

2) La kvanto de nia instrumaterialo por gejunuloj inter 13- kaj 17-jaraj en la tritagaj kursoj montriĝis iom tro granda. Ni do konkludas, ke por ĉi tiu aĝo necesas pli da preparo, antaŭ ol veni al eksterlando por lerni kun alilandaj samaĝuloj (do, prilabori kvar ĝis ses lecionojn hejme).

3) Por la juna aĝo tre gravas diversaj ekzercaj aldonaĵoj – ĉefe la bildstrioj, filmoj kaj ludoj. Por la plenkreska publiko pli gravas mallongaj ŝercoj kaj reci-proka parolado.

4) Al ĉiuj aĝoj tre plaĉas la du ĉefaj trajtoj de la Zagreba Metodo: grupa memlernado (en la unua parto de lecionoj ĉiu mem lernas la gramatikon kaj vortojn el la baza lernolibro) kaj la duopaj interparoloj (post la diversaj ekzercoj en ĉiu leciono, oni dediĉas 15 ĝis 20 minutojn al interparoloj. La kursanojn oni dividas en duopojn, kiuj ne tro laŭte interparolu sen instruista kontrolo).

5) Vigligaj filmoj en paŭzoj kaj ĉeesto de eksterlandanoj estas bonegaj motiviloj por plua lernado. Post ĉiu kurso la lernantoj anonime plenigas enketilojn, esprimante sian kontenton aŭ malkontenton. En ili ĉiuj senescepte asertis, ke ili deziras plulerni Esperanton.

6) Grava problemoj, kiun frontas la Zagreba Metodo, estas la psikologio de instruistoj. Eĉ kun bona volo kaj teoria kompreno de la modelo, ili ne kuraĝas ĝuste apliki la ĉefajn ecojn de la metodo: la memlernadon kaj la duopajn interparoladojn. Ŝajnas al ili iel strange rezigni pri sia instruista rolo kaj fariĝi simple organizantoj kaj animantoj. Nur kiam ili propraokule spertas (se gvidas la kurson iu alia), ke tio fakte bone funkcias kaj ke la lernantoj estas pli kontentaj kaj sukcesaj ol en klasika kurso, ankaŭ ili mem kuraĝas apliki ĝin.

Intertempe la Zagreba Metodo ĉiam pli disvastiĝas. Aperis la novaj identaj eldonoj en la malta kaj itala lingvoj. Ankaŭ la katalunoj aplikas ĝin kaj jam pretigis la katalunan eldonon. Ankaŭ la kastililingvanoj interesiĝas pri adapto de la lernolibro. Eduka Fondaĵo Carson finance helpis la eldonon de la angla kaj franca lernolibroj. La angla ĵus aperis kaj la franca estos finpresita en la unua duono de la nuna jaro.

Aparte interesaj estas specialaj aplikoj de la Zagreba Metodo. La principo pri prioritata lernado de la plej oftaj elementoj aplikiĝis en loka radiostacio apud Zagrebo, por instrui Esperanton per dek 15-minutaj elsendoj. Multaj aŭskultantoj ĉiufoje telefonis kaj rekte dum la elsendo solvadis la taskojn. Aŭskultis la elsendon regule plurmil aŭskultantoj. La elsendo facile adapteblas por iu ajn lingvo aŭ loka radiostacio. Roger Imbert adaptis la metodon por speciala kurso kiel semajnfina enkonduko al posta koresponda kurso. S-ino Anne Whitacker kaj Derek Roff aldonis pliajn ekzercojn: la unua mallongajn poemojn kaj la dua lumbildan filmekzercon.

Sendube la Zagreba Metodo daŭre progresas kaj evoluas. La aŭtoroj kaj Internacia Kultura Servo havas ambiciajn planojn: plupresi libroserion "Facila Esperanto", novajn bildseriojn, finprodukti serion da vidbendoj kaj pluevoluigi la duan ŝtupon post la baza lernolibro. (Por tiu dua nivelo jam estas havebla 12-leciona ekzercaro *Esperanto ne estas nur lingvo*, kaj oni presas duagradan lernolibron.)

Zlatko Tišljarić

La Estraro, la Centra Oficejo kaj la redakcio de la revuo plej kore dankas pro la multaj novjaraj bondeziroj, kiujn ili sincere reciprokas.

Kalendaro

En ĉi tiu kompletiga kalendaro ne aperas aranĝoj jam menciitaj en la novembra numero. La ĉefa kalendaro kiel kutime aperos en marto. Organizantoj, kiuj ankoraŭ ne sendis informojn pri ĉi-jaraj aranĝoj, bv. zorgi, ke ili atingu la Centran Oficejon antaŭ la 10a de februaro (kun la indiko "Por la revuo Esperanto/marta Kalendaro"). Ni publikigos informojn nur pri renkontiĝoj de internacia intereso.

Januaro

25-26 Kunveno de Nederlanda Eo-Junularo, Enschede, Nederlando (NEJ, p/a s-ro M. de Graaf, Brinkstr. 78, NL-7512 EE Enschede)

Marto

13-18 2a Int. Eo-Turisma Simpozio, Budapeŝto, Hungario (Express, S-ino M. Evva, Szabadság tér 16, H-1395 Budapest)

14-16 Int. Foira E-ista Renkontiĝo, Leipzig, Germana DR (IFER '86, Distrikta Estraro de Kulturligo de GDR, Käthe-Kollwitz Str. 115, DDR-7010 Leipzig)

14-17 Int. Eo-Teatra Renkontiĝo, Budapeŝto, Hungario (vd. 13 marto)

20-27 4a Seminario por Eo-aktivuloj, Varsovio, Pollando (J. Parzyszek, p/a SKN-Esperanto, ul. Moniuszki 16/20, PL-87-100 Toruń)

28-31 Paska kunveno en Nederlando, Someren (S-ino D. Derksen, Wagnerplein 238-2, NL-5011 LZ Tilburg)

28-31 70a Brita Kongreso de Eo, Loughborough, Britio (S-ino S. Folkard, 20 Great Central Road, Loughborough, LE11 1RW)

28-01 apr. Int. Konferenco pri Eo-Propagando, Vraca, Bulgario (Esperanto, P.k. 66, BG-3000 Vraca)

29-31 Kongreso de SAT-Amikaro, St. Pierre de Chandieu, Francio (S-ino A. Nove, RN7, La Lignière, F-69630 St. Symphorien d'Ozon, Francio)

29-02 Seminario de UFE por Eo-instruantoj, Bauge, Francio (S-ino R. Triolle, 4 impasse des Charpentiers, F-57100 Thionville)

31 Limdato de la Belartaj Konkursoj de UEA. Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas.

Aprilo

04-06 Junulara Eo-Renkontiĝo, Gyula, Hungario (Junulara Komisiono de HEA, Pf.193, H-1368 Budapest)

04-09 Int. Scienca Seminario "Jurij Gagarin", Vraca, Bulgario (Bulgara Astronaŭtika Societo, P.k. 279, BG-3000 Vraca)

08-12 "Esp-istoj por la paco kaj malarmado", Volgograd, Sovetunio (Sovetia MEM-Sekcio/ASE, prospekt Kalinina 14, SU-103885 Moskva K-9)

11-13 Skota Eo-Kongreso, Newbattle Abbey College, Edinburgh, Britio (R. Calder, 92 Liberton Brea, Edinburgh, EH16 6LB)

27-01 maj. 14a Scienca Interlingvistika Simpozio, Varsovio, Pollando (ACI, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa)

Majo

01-03 12a Unuamaja Eo-Renkontiĝo, Visoko, Jugoslavio (Eo-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo)

02-04 Sveda Eo-Kongreso, Örebro, Svedio (B. Andersson, Ingegatan 4A, S-541 50 Skövde)

03-04 64a Kongreso de Federacio de laboristaj Esp-istoj, Hago, Nederlando (S-ino R. Hoogeland, Vlasdonk 1, NL-1112 JD Diemen)

09-11 Int. Pacmarŝo "Zamenhof", Veröcemaros, Hungario (Budapeŝta Komitato de HEA, Pf.193, H-1368 Budapest)

09-15 Int. Foiro de Eo-Kulturo, Zielona Góra-Raculka, Pollando (J. Rządzyk, ul. Krośnieńska 3 B/15, PL-65-001 Zielona Góra; F. Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen, FR Germanio)

14-20 Eŭropa Semajno, Hamburgo, FR Germanio (S-ino E. Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80)

16-20 88a Franca Kongreso de Eo, Gérardmer, Francio (UFE, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)

17-23 38a Kongreso de Internacia Fervojista Eo-Federacio, Skopje, Jugoslavio (IFEK-Kongreso, p/a Feroturist, Pf. 270, YU-91000 Skopje)

23-25 2a Trilanda Eo-Renkontiĝo, Pécs, Hungario (HEA, vd. 09 majo)

23-29 Int. Eo-Konferenco "Internaciismo de Hristo Botev kaj Nia Nuntempo" + Konkurso, Vraca, Bulgario (Esperanto, P.k. 66, BG-3000 Vraca)

Junio

06-08 Konferenco por firmigi sanigan vivmanieron, Bankja, Bulgario (BEA, Bul. Hr. Botev 97, BG-1303 Sofia)

16-30 Ekskursa Feriado por Esp-istoj/rivera, Sofio/Vidin/Ruse/Varna, Bulgario (vd. 06 junio)

21-27 2a Junpionira Eo-Somero, Ozren, Jugoslavio (vd. 01 majo)

27-03 jul. Somera Eo-Universitato, Gyula, Hungario (P. Fényes, TIT, 48-as u. 11, H-5700 Gyula)

27-30 28a Kanada Kongreso de Eo, Otavo, Kanado (PO Box 801, station "B", Ottawa, Ontario, K1P 5P9)

30-18 jul. Eo-Kursaro, San-Franciska Ŝtata Universitato, Usono (S-ino C. Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010)

Julio

01-10 7a Somera Eo-Lernejo, Pale, Jugoslavio (vd. 01 majo)

5-13 Ea Ŝakfestivalo, Poděbrady, Ĉeĥoslovakio (L. Fiala, Fügnerova 28, CS-290 01 Poděbrady)

05-14 Int. Naturamika Eo-Renkontiĝo, Abaliget, Hungario (Eo-Komitato, Pf.2, H-7601 Pécs)

08-18 Renkontiĝo de esp-istaj instruistoj de Freinet-pedagogio, Challans, Francio (P. Poisson, 239 rue V. Hugo, F-37450 St-Cyr-sur-Loire)

11-18 Lernejana Eo-Kampado, Lago Balatono, Hungario (vd. 13 marto)

13-19 Turisma Esp-ista Mara Renkontiĝo, Burgas, Bulgario (S-ino E. Stojkova, ž.k. Slavejkov 22, vh.7, ap.7, Burgas)

15-24 Int. Esp-ista Ŝakfestivalo, Targovište, Bulgario (S-ino M. Rajčeva, ul. Partizani 9A, BG-7700 Targovište)

16-28 Somera Eo-Lernejo, Eger, Hungario (vd. 13 marto)

18-23 Kongreso de ELNA, San-Franciska Ŝtata Universitato, Usono (vd. 30 junio)

24-20 aŭg. Int. Junulara Eo-Laborbrigado, Tjentište, Jugoslavio (vd. 01 majo)

26-02 aŭg. 71a Universala Kongreso de Eo, Pekino, Ĉinio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

27-01 aŭg. 8aj Turismaj Tagoj en Žilina, Ĉeĥoslovakio (Ing. J. Gondžúr, Levočská 3, Vlčince 3, CS-010 08 Žilina)

Sentoplena novelaro por maturaj lernantoj

Lasu min paroli plu!, Claude Piron (1931). Chapecó: Fonto, 1984. 127p. 21cm. Prezo: 13,80.

La aŭtoro volis verki legolibron, kiu plenumu du intencojn: unue, ne forpeli la atenton de la leganto-lernanto, due, doni al li aŭ ŝi eblecon ne nur reuzi la lernitaĵojn, sed ankaŭ pluprogresi en la "latenta esprimpovo" (p.7) de la lingvaj elementoj jam studitaj.

Mi ne dubas, ke en ambaŭ kazoj li plene atingis siajn celojn. Rilate la unuan punkton, mi citas el la lasta ĉapitro, kie oni kritikas tekstojn kutime tro-
vblajn en ordinara legolibroj: "Estis suferige, por mia digneco de mezjuna viro, devi sekvi la knabecajn rakontojn, kiujn tiu kurso proponis al ni. Jam antaŭ longe mi forlasis la infanetan lernejon kaj nur persono, kies kapo fuŝe funkcias, povis imagi, ke tia rakontaĉo kontentigos normalan kursanaron" (p.124).

Kiel do la aŭtoro sukcesis forbalai la "knabecajn rakontojn" kaj "rakontaĉojn"? En zorga novmaniera kunmeto de tekstoj, la aŭtoro, anstataŭ paroli pri nudaj, sensukaj faktoj, plenkonscie elektis paroli pri sentoj, eĉ la plej intimaj. Li prezentas amkonfesojn (p.39, 67), eĉ amdeklaron (p.12) kaj amaventuron de instruisto (p.70); li parolas pri feliĉa amo (p.39) kaj pri malfeliĉa okazo de estinta amo (p.48), certe la plej bela teksto en la kolekto, ĉar la plej kortuŝa. Li parolas pri admonoj, pro malplena sukerujo (p.16), al

kunulo pro brandotrinkemo (p.34). En la gamo de la sentoj ni trovas nostalgion (p.93), adiaŭon de forfluganta elmigranto al la lando de sia juneco (p.96), belan leteron de malliberulo (p.104). Ni trovas ankaŭ prispionajn intrigojn (p.52, 88) kaj tre amuzan, kvankam vere dramecan, unudirektan telefon-interparolon (p.117).

La kolekto de 35 tekstoj celas esti paralela legolibro por la lingvoinstrua romano *Gerda malaperis!* Sed oni facile

povas ĝin uzi ankaŭ memstare por progresanta kursanaro, kiam oni volas provizi la lernantojn per materialo ebliganta tujan komprenon kaj dialogon.

Rilate la duan celon, ke la tekstoj "enkondukos lin [= la lernanton] en la vortfaran sistemon" de Esperanto (p.7), ŝajnas evidente, ke ankaŭ tiu intenco plenumiĝis. La lernanto tuj perceptos kaj komprenos la eblecon de pluraj esprimoj samsencaj: ekzemple "la knabino en la spegulo. Tiu enspegula knabino..." (p.9); "sentima (sen-tim-a), sed sentema (sen-tem-a)" (p.68); "nenifaro (= neni(o)-faro, faro de nenio)" (p.84); "Mi ne estis sufiĉe singarda. Oni neniam gardas sin sufiĉe kontraŭ..." (p.107).

Pro la enhava idearo la libro pli taŭgas por junuloj aŭ plenkreskuloj ol por geknaboj.

La tekstoj estas en ordinara vivoplena stilo, en lingvaĵo tute regula. Nur unu eta atentigo pri la uzo de la sufikso -ec: dum sur p.12 oni trovas: "pri la belo de la tago, pri la bono de la naturo, pri la grandeco de la mondo", sur aliaj paĝoj Piron por la samaj ideoj uzas sufiksitaĵojn: "La grandeco de la homo kuŝas en libereco" (p.45) ks. Plej severa unueco devus regi en libro por lernado.

La libro estas bonega, rekomendinda. Ĝi estas pli ol simpla legolibro, ĝi povas roli kiel unua kolekto de noveloj, en kiu trablovas amo, kortuŝeco kaj intimaj sentesprimoj.

Roberto Lloancy (Francio)

Pri leksikografio itale kaj "itala PIV"

Lineamenti di lessicografia dell' esperanto, Pietro Rizzo. Pisa: Edistudio, 1983. 61p. 24cm. Prezo: 7,50 guldenoj.

Vocabolario esperanto-italiano, Umberto Broccatelli. Milano: Cooperativa Editoriale Esperanto, 1984. 16+482p. 22cm. Prezo: 57,00 gld.

"Klarigo" sciigas, ke *Lineamenti* kreskis el recenzo pri *Vocabolario italiano-esperanto* (Vortaro itala-Esperanta) aperinta en 1982, kaj (nekompreneble), ke oni verkis ĝin itale, ĉar oni celis ordinariajn esperantistojn. Malgraŭ Esperanta enkonduko, esperantologoj neitallingvaj estas la malgajnintoj, ĉar la verko, analizante ĉiujn gravajn vortarojn ekde la Universala Vortaro de 1893, amasigas grandan kvanton da faktoj rilataj i.a. al la triopo de vortoj Fundamentaj, Oficialaj kaj Zamenhofaj kaj al la kategorio de la radikoj (p.22-25 kaj 52). La Baza Radikaro estas nomita kontraŭ-Fundamenta pro tio, ke ĝi ŝanĝis kelkajn kategoriojn de la Universala Vortaro, dum Zamenhof rifuzis ŝanĝi eĉ erarojn tie (p.24).

CLAUDE PIRON

LASU MIN
PAROLI PLU!



"De la 'Vortaro' de Kabe al PIV [*Plena ilustrita vortaro*] kuras ligo neinterrompita,..." (p.21).

Rizzo meritas aplaŭdon, sed ne nur en Italujo. Por tion havi, li devus tradukigi almenaŭ paĝojn 7-31. Tiam li povus ankaŭ korekti erarojn, kiel diri, ke Zamenhof tradukis la Biblion (p.11 kaj 18), ke Rhodes verkis vortaron Esperantan-anglan (p.12), kaj kiel ne menci la vortaron de Millidge (1912) kaj ties Suplementon (1957), ne meti daton post "Fulcher e Long" (1921, p.38) kaj lasi presaron sur p.9 (legu 1889 anst. 1884) kaj p.15 (1925 anst. 1923).

Plaĉe kaj klare presita, forte tolbroŝurita, *Vocabolario* estas bazita sur PIV, kiel "verko aŭtoritata". Tiel signoj distingas kapvortojn laŭ la triopo menciita supre, kaj nuancoj estas numeritaj laŭeble kiel en PIV. Adopto al nacia lingvo kunportas, ke difinoj ne ĉiam necesas: sufiĉas diri, ke "aviado" signifas *aviazione*. Tiel oni gajnas spacon, utilan kiam oni tamen volas difini. Citaĵoj ne estas alskribitaj al ekz. Zamenhof. Foje helpas signifo anstataŭ difino, ekz. "gluto" (buŝpleno, trinketo), en PIV nur sub "trinki". Mankas vortoj, kiel "kapstano", kaj alternativoj, kiel "aprezi"; aldoniĝas signifoj, kiel *derrick* por "argano", sen aludo al grupo. Rilate amplekson: 30 kapvortoj por Ĵ en du paĝoj (kun 106 linioj por "ĵeti") kontraŭ 40 en tri kaj duona paĝoj (kun 188 linioj por "ĵeti") en PIV.

Jen itala PIV, ĉiel laŭdinda. Ĝi staros apud PIV sur miaj bretoj.

D.B. Gregor (Britio)

Foje esprimplene trafa

Vespero jam fariĝis; Agregajoj kaj robajoj, Rikardo Ŝulco (Richard Schulz, 1906). Paderborn: Esperanto-Centro, 1985. 66p. (nenumeritaj). Ilus. de la aŭtoro. 21cm. ISBN 3 922570 39 9. Prezo: 21,00 gld.

La verko konsistas el 60 "kosmogenezaj agregajoj" (obsedaj desegnoj de interplektitaj figuroj kaj vizaĝoj) kaj 180 robajoj de Richard Schulz. "Verdire mi ne scias okupon pli agrablan/ol krei versojn... kaj ilin tuj prodigi." Tion li ŝatas, celas kaj faras. Foje li ripetas la samajn rimojn (1: sorto, morto, forto; 25: perforto, sorto, morto), ofte li uzas adasismojn (ekz. en 52: frateco, humaneco, stulteco), sed aliffoje li esprimplene trafas:

Fenestrokadra luno ruliĝas malrapide
Kaj fine malaperas. Mi sidas maldecide,
Maldormas, kaj meditas. La nokto lante pasas.
La lun' ne plu konsolas. Latentas Mars' inside.

La desegnoj kaj robajoj estas sendependaj; tial la temoj diversas: la senlima kaj laŭhazarda universo, vivo kaj morto, kristana mesaĝo, malfido al tekniko kaj progreso, kritiko kontraŭ la vivkoncepto de Umar Kajjam, fido al Esperanto (sed ne al ĝia nuna situa-

cio), defendo de la Fundamento... kaj de tempo al tempo ankaŭ iom da humuro.

La aŭtoro mem liveris al mi adekvatan robajon por fini la recenzon:

Nek povas la robajoj samrangaj ĉiuj esti,
Nek ĉiujn la legantoj facile tuj digesti.
Se iu estas bona, leganto, tiam ĝoju!
Kaj kontraŭ la aliaj bonvolu ne protesti!

Jorge Camacho (Hispanio)

Disko por infanoj

Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj, Sylla Chaves (1929) k.a. Rio-de-Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, 1983 (ne indikite). 30cm. 33t/m. Monofona. 15-paĝa ilustrita diskokovrilo. SC-014. Dulingva: portugala-Esperanta. Prezo: 27,00 gld.

Ĉi tiu longedaŭra disko havas kvin porinfanajn kantojn kaj unu poemon kun muziko, akompanatajn de abunde kaj bele ilustrita tekstaro. La tuto ŝajnas bela kaj alloga afero, rezulto de multe da streĉa laboro kaj de konsiderinda elspezo.

Sed tuj komenciĝas la duboj. Ekzemple, sur unu flanko de la disko aperas la ses eroj en Esperanto, kaj sur la alia flanko reaperas tiuj samaj ses eroj en la portugala. Do por neportugallingvano duono de la disko estas senutila. Same neutilaj por esperantisto estas la detalaj informoj portugallingvaj pri Esperanto, kiuj okupas du paĝojn de la tekstaro.

Aliflanke, por portugallingva neesperantisto, estas nebezona la Esperanta parto, ĉar ĉio aperas ankaŭ en la portugala.

Kredeble la disko estas farita por krei bonan impreson pri Esperanto; sed tiuokaze kial provi imponi al plenkreskuloj per porinfana disko?

Preskaŭ duonon de la disko okupas la supozeble instrucela poemo-kun-muziko, kies titolon portas ankaŭ la disko. Des pli bedaŭrindas, ke nek la poemo nek la muziko estas aparte interesa, kaj la akompanaj bildoj, tre kompetente faritaj, ŝajnas iom arbitre

Unu el la multaj desegnaĵoj de la 15-paĝa ilustrita diskokovrilo.



kompilitaj por konveni al la iom nekohera teksto. Estas malfacile vidi kiucele oni produktis la diskon. Por krei sukceson ne sufiĉas bonaj intencoj.

Geoffrey King (Britio)

Gutoj da poetiko

Kontrastoj, Carmel Mallia (1929). Zabbar: La aŭtoro, 1980. 47p. 19cm. ISBN 0 902756 12 5. Prezo: 6,60 guldenoj.

Kontrastoj tiel titoliĝas unuavide pro la magia asocio de la vortoj; "Miaŭas miaj aventuroj/tra la spleno de la cirkonstancoj"; kaj enhance, pro la kontrastoj, ĉu la vivo indas kaj ĉu la vivo estas enuiga. La pecoj preskaŭ priskribas la internon de memo. La ekstera mondo apenaŭ sentiĝas, krom du pecoj rekte prikan-tantaj la insulon Malto, la hejmlandon de la aŭtoro. La verko estas de homo intelekta, kies realaj vivzor-
goj ne aperas; la pensoj estas kondensitaj en gutoj de poetiko, kie sukon ĝuu poeziamantoj. La verko estas frukto de pli ol dudekjara poemverkado. Por plengui, la pecoj prefere estu aranĝitaj aŭ kronologie aŭ laŭ temo-gamo.

Sibayama Zyun'iti (Japanio)

Gemo por lingvoamanto

Geiriadur Esperanto/kimra vortaro de J.C. Wells (1940). Londono: Grupo Kvin – Esperanto en Radio kaj Televido, 1985. 127p. 15cm. Prezo: 12,90 gld.

Unu el la plej signifaj kontribuoj, kiujn povas fari la esperantistaro por lingva egaleco, estas rekoni kaj estimi la malgrandajn lingvojn. Ni devas do saluti entuziasme la eldonon de verkoj kiel *Geiriadur Esperanto/kimra vortaro* de la eminenta lingvisto John C. Wells.

Ĉi tiu eta vortaro estas bazita sur la kimra ŝlosilo de G. Griffiths, eldonita en 1910 kaj reviziita de W. Harris en 1956. En sia dulingva antaŭparolo Wells informas nin, ke en la komenco li intencis traduki en la kimran nur la radikojn de la Baza Radikaro Oficiala. Fine li aldonis 600 pliajn radikojn, kiujn li juĝis necesaj por la praktika uzanto. Krom la vorttradukoj mem, Wells enmetis koncizajn gramatikajn kaj histor-
ri-
resumojn: en Esperanto pri la kimra lingvo kaj nacio, kaj en la kimra pri Esperanto.

Kvankam principe la vortaro estas bonega aldono al la komparaj lingvistikaj rimedoj de Esperanto, ĝi tamen prezentas kelkajn problemojn al la uzanto. Iuj el tiuj problemoj estas neeviteblaj, kiam oni preparas Esperantan vortaron por etna lingvo. Ĉe la kimra tiu problemaro fariĝas akuta. Ekzemple, la kimra vorto por "dento" estas *dant*. Sed ĝia plurala formo estas *danedd*, kaj la vorto por "dentisto" estas *deintydd*, ambaŭ neregulaj formoj. La vortaro ne donas informojn pri neregulaĵoj. Entute la kimra havas malmultajn stabilajn radikojn kaj multegajn manierojn por pluraligi. Tiuj, kiuj ne estas denaskaj parolantoj de la kimra, spertas grandajn malfacilaĵojn en ĉi ties mas-trado. En la vortaro de Wells, vortoj aperas sen plu-
rala formo kaj sen signo pri gramatika karaktero. La

tre uzata angla-Esperanta vortaro de Wells ofertas pli da helpo.

Strangaĵo de la vortaro estas subitaj ekflugoj en literaturajn elŝpinaĵojn, en alie skeleta kunteksto. Por multaj pli junaj kimreparolantoj, la tradukoj de "trafikŝildo", "neperforta manifestacio" kaj, pli ordi-nare, "lavmaŝino" estus eble pli utilaj.


Por lingvoamanto, aŭ kimra aŭ esperantista, ĉi tiu vortaro estas gemo; por denaska kimreparolanto, uti-lega; sed eble la ordinara vojaĝanto trovos ĝin iomete malpli praktika.

Jane Edwards (Usono)

La vivo en Ĉinio

Mia vivo, div. aŭtoroj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 127p. Ilus. 19cm. Prezo: 3,60 guldenoj.

Se vi abonis al *El popola Ĉinio* dum 1982-83, vi eble memoras kelkajn artikolojn sub la rubriko "Mia



Prezento de enlandaj opinioj pri la vivo en Ĉinio.

vivo". Post kelkaj mallongigoj, oni librigis tiun arti-kolaron samtitole.

Tra tiu belaspekta libro dudek personoj, elektitaj el diversaj socitavoloj, kun sukcesaj karieroj kiel advokato, bakteriologo, dancistino ks. ĝis ŝoforo, teksistino ktp. malkaŝeme rakontas sian vivon skize kaj facillingve. Do, ĉi tiu kompilaĵo estas pli ĝuste aŭtobiografiaro. La akompanaj fotoj ne estas la samaj, kiuj aperis en *El popola Ĉinio*. Bona trajto de ĉinaj eldonaĵoj estas, ke oni ne frontas hurdojn da eraroj.

Ĉu vi scias kiel la lamaoj vivas post "la demokrata reformo"? Kian vivon nun spertas la lasta imperiestro de la feŭda socio de Ĉinio? Ĉu vi konas la vivkondi-
ĉojn de la kamparanoj?

Antaŭ ol traveturi la landon por fari proprajn konstatojn, oni legu ĉi tiun verkon.

P.V. Ranganayakulu (Hinda Unio)

Kontribuojn bonvolu sendi al la redaktanto de ĉi tiu rubriko: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Antaŭ la 42a IJK: Kulturbildo pri Israelo

Pere de ĉi tiu artikolo, ni prezentas la landon, kie okazos la 42a Internacia Junulara Kongreso de la 14a ĝis la 21a de aŭgusto. La artikolo estas bazita sur la skemo de "kulturbildoj" (kiun iniciatis Baldur Ragnarsson, estrarano de UEA pri kulturo kaj edukado): provo doni koheran rigardon al ĉiuj landoj kaj kulturoj de la mondo. Komentoj kaj proponoj de legantoj estas bonvenaj ĉe la supra adreso.

Israelo estas lando de surprizoj kaj kontrastoj, eĉ por tiuj, kiuj ĝin vizitis jam pli ol unu fojon. Situant ĉe la orienta Mediteraneo, ĝi estas ekstreme okcidenta stile kaj karaktere. Tie la antikva lingvo de la Malnova Testamento, la hebrea, transformiĝis el sankta lingvo en ĉiutagan modernan lingvon. Tamen, oni povas aŭdi tie, surstrate kaj endome, preskaŭ ĉiujn lingvojn de la mondo. Tia estas la karaktero de la loĝantaro: judoj, kiuj enmigris el ĉiuj mondpartoj post dumiljara ekzilo; iliaj naskitoj, kiuj ofte scipovas nur la hebrea lingvon, kaj ankaŭ aliaj etnoj: araboj kaj druzoj.

En Israelo troviĝas sanktaj lokoj de islamanoj, judoj kaj kristanoj. Kvankam ĝi ofte estas fokuso de

interesiĝo de mondaj amaskomunikiloj, tamen, oni ne forgesu, ke ĝi estas unu el la plej malgrandaj landoj. Oni per aŭto povas trapasi ĝin laŭlonge dum malpli ol unu tago kaj laŭlarĝe dum 90 minutoj!

Estante konata en la Malnova Testamento kiel "La lando de lakto kaj mielo", Israelo dum la lastaj generacioj refariĝis grava agrikultura produktanto, transformante la dezerton kaj rokaron en kultivejojn. Malgraŭ ke la plimulto de ĝiaj novvenintoj estas el evoluantaj landoj, Israelo hodiaŭ estas moderna industriŝtato. Ĉefe elstaras la sciencetknologiaj produktoj, kiujn oni grandparte eksportas. Dum kelkaj jardekoj la nova ŝtato famiĝis pro siaj kontribuoj al la kampoj de edukado, scienco, medicino kaj artoj.

La rapida kresko de la nova socio, unuflanke, kaj la altaj sumoj dediĉataj al sekurecaj celoj, aliflanke, en la lastaj jaroj kaŭzis ekonomian krizon, kiun la nuna registaro prioritare klopodas solvi.

La klimato estas varia, depende de la geografia zono: en la sudo (Negebo) estas varme eĉ vintre kaj preskaŭ neniam pluvigas, dum en la nordo (Galileo) kaj en Jerusalema Montaro ofte pluvigas dum vintro kaj foje eĉ neĝas.

La varieco de la topografiaj kaj klimataj kondiĉoj, kiuj karakterizas Israelon, donas al ĝi flaŭron, konsideratan kiel unu el la plej riĉaj kaj variaj en la mondo. Pli ol du mil specioj de plantoj reprezentas tre grandan koncentriĝon de flaŭra abundo en relative mal-




La ĉemara Tel-Avivo.
Sur paĝo 15: Elaera
panoramo de la impona
iama fortikaĵo Masada,
konstruita ĉirkaŭ
150 a.K. apud la
Morta Maro.

Fotis: W. Braun kaj Z. Radonvan

granda areo. Simile estas pri la faŭno. Hodiaŭ oni konas tie ĉirkaŭ cent speciojn de mamuloj, saman nombron da rampuloj, 450 fiŝojn kaj ĉirkaŭ 400 birdojn.

Troviĝas pli ol kvar milionoj da loĝantoj, el kiuj ĉirkaŭ 3,3 milionoj estas judoj. Pli ol tri kvaronoj de la nejudoj estas islamanaĵ araboj, la aliaj estas kristanoj (ĉefe araboj) kaj druzoj.

Israelaj leĝoj celas garantii al ĉiu religio ĝian komunan vivon, inkluzive de religiaj tribunaloj. Dum la judaj sabato kaj festotagoj estas oficialaj ripoztagoj, ĉiu religia komunumo rajtas observi la siajn. La hebrea kaj araba estas la oficialaj lingvoj de la ŝtato, kaj ĉiu komunumo havas la rajton je libereco de edukado kaj kulturo. Ekzemple, por la arabaj infanoj ekzistas aparta reto de lernejoj, kie la studoj okazas en la araba. Israelo estas parlamenta demokratio, en kiu la supera leĝodona aŭtoritato estas la parlamento aŭ "Kneset". Ĝi konsistas el 170 membroj, kiuj estas elektitaj per ĝenerala balotado laŭ sistemo de proporcia reprezentado. La oficiala ŝtatestro estas la prezidanto, kiun elektas la parlamento. Sed lia ofico fakte



estas simbola, ĉar pri la praktika regforto disponas la registaro (ministraro). Ĉi tiu estas gvidata de la ĉefministro kaj estas kolektive respondeca antaŭ la parlamento.

En Israelo oni provas krei novan kulturon, en kiu kunfandiĝas la riĉeco de la kulturoj kaj tradicioj de la "okcidentlandaj" judoj kun tiuj de la "orientlandaj" judoj. Iom post iom ekformiĝas israela popola muziko, israela kuirarto ktp.

La plej uzata trafikilo estas la aŭtobuso. La fervojo ne estas tiel disvastiĝinta kiel ekzemple en Eŭropo, ĉar la trajno kunligas precipe nur la tri ĉefajn urbojn: Jerusalemo, Tel-Avivo kaj Hajfa. Ekzistas ankaŭ taksiretoj, per kiuj oni povas iri de loko al loko kontraŭ relative malalta sumo.

Interesaj faktoj:

- En Israelo la semajno komenciĝas je dimanĉo, ĉar sabato - la ripoztago - estas la lasta tago de la semajno;
- Israelo estas la centro de plia religio, la bahaa;
- La plej malalta loko en la mondo estas la Morta Maro (hebree: Maro de la Salo). Tie eblas flosi sur la akvo sidante;
- En Israelo ekzistas aparta formo de vilaĝo, la kibuco, en kiu ĉiuj loĝantoj dividas inter si preskaŭ ĉiun proprajn. Nuntempe ekzistas ĉirkaŭ 450 kibucoj;
- Ĉiu loĝanto de Tel-Avivo konas la nomon Zamenhof, ĉar la ĉefa popola kuracejo de tiu metropolo portas lian nomon (tute hazarde, ĉar ĝi troviĝas ĉe la strato Zamenhof!);
- Oni diras, ke Israelo estas la sola loko en la mondo, kie la infanoj instruas al la gepatroj la gepatran lingvon;
- Eblas atingi Israelon per rekta aŭtobuso el Kairo, transirante Sinajon dum kelkaj horoj;
- Ĉiutage eldoniĝas gazetoj ankaŭ en la angla, franca, rumana, hungara, jida, germana, pola kaj rusa lingvoj;
- Pro la alta inflacio oni en la nunaj monatoj transformas la israelan monunuon, la siklon, en novan siklon, fortranĉante tri nulojn, tiel ke mil sikloj fariĝos unu nova siklo.

Josef Šemer

Trejniĝu en Varsovio

TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kaj Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK) invitas al la 4a komuna seminario por trejnado de Esperanto-aktivuloj, kiu okazos de la 20a ĝis la 27a de marto en Varsovio.

La ĉeftemo de la seminario estas "KER – kiu-cele?". KER estas la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO. La seminario celas memori pri la historio de KER, analizi ĝian agadon, refreŝigi pionirajn ideojn kaj precizigi bazajn nociojn de KER, kiel neŭtralecon, eksterajn rilatojn ks.

Paralele kun tiu temaro, la seminario traktos la troinan agadon de TEJO por progesigi la laboron de la Komisiono pri Aktivula Trejnado. Oni esperas pliriĉigi la materialon por serio da broŝuroj pri trejna aktivado.

La programo efektiviĝos per prelegoj, sekvataj de laborkunsidoj kun spertaj esperantistoj. Kultura Esperanto-Societo de PSEK prezentos distrajn kaj kulturajn programojn.

Por pliaj informoj pri aliĝo al la seminario, orient-eŭropanoj skribu al: Jarek Parzyszek, p/a SKN-Esperanto, ul. Moniuszki 16/20, PL-87-100 Toruń, Pollando; aliaj skribu al: Franz Kruse, Mathildenstr. 73, D-2800 Bremen 1, FR Germanio. Loĝantoj de Francio kaj Italio bonvolu kontakti sian propran junularan sektion. Oni sendos oficialan invitilon, kiu liberigos la partoprenanton de la deviga monŝanĝo.

Amo kaj morto en Balio (1937), Vicki Baum (1888-1960). El la germana trad. P.H. Mooij. Roterdamo: UEA: 1986. 420p. 21cm. ISBN 92 9017 033 6. Sociologie fascina romano pri la tradicia vivo sur la indonezia insulo Balio. Prezo: 28,50 gld.

Barbiro de Sevilla, La, (1775), P.-A.C. de Beaumarchais (1732-1799). El la franca trad. (1974) Kiril Drajev (1904). Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1985. 64p. Ilus. 21cm. Speciala literatura n-ro de *Franca esperantisto*. Fama kvarakta komedio. Prezo: 6,90 gld.

Bestoĝardeno, Lin Songjing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 72p. (nenumeritaj). Kolorilus. 21cm. Ĉiun dupaĝan pentraĵon de besto akompanas kvarversa strofo por infanoj. Prezo: 5,70 gld.

Bronza tigro; Historia dramo kvinakta (ĉ.1940), Gŭo Moĵŭo (Guo Moruo, 1892-1978). El la ĉina trad. Seimin. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 122p. Fotoj. Mapo. 22cm. Bind. Teatraĵo pri okazaĵo el la ĉina historio koncerne la komandon de armeo en la jaro 262 a.K.; kun historia noto kaj biografio pri la aŭtoro, eminenta verkisto kaj arkeologo. Prezo: 12,60 guldenoj.

Eta sabat-dimanĉa brevierio, komp. B. Eichkorn. Meßkirch: la kompilinto, 1985. 59p. Ilus. 21cm. Kristana kantlibro kun muziknotoj. Prezo: 15,00 gld.

Fabloj, G.E. Lessing (1729-1781). El la germana trad. R. Hauptenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 41p. 21cm. Jubilea Eldonserio 2: Beletro tradukita 13. La koncizaj, pensoklaraj kaj ofte akraj fabloj de Lessing. Prezo: 12,30 gld.

Fiera generalo, La, Hŭa Ĝjun'u. El la ĉina (1964) trad. Laŭlum (Li Shijun). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985 (2a eld.). 21p. (nenumeritaj). Kolorilus. 25cm. Porinfana rakonto pri la malvirto de la fiero. Prezo: 2,40 gld.

Histoire du mouvement espérantiste en Roussillon, J. Amoureux, M.-T. kaj R. Lloancy. Prades: Conflent, 1985. 114p. Ilus. 24cm. Kompetente produktita franclingva historio pri la loka Esperanto-movado en Roussillon; kun bibliografio kaj indeksoj. Prezo: 20,10 gld.

Fundamenta vortaro naŭlingva, komp. Hakuta Masao. Tokio: Asake-Syoboo, 1985. 820p. 26cm. Pli ol 7 000 kapvortoj, alfabeto ordigitaj laŭ Esperanto, kun precipe unuvortaj tradukoj en la japana (plus oficiala latinlitera transskribo), la franca, angla, germana, pola, hispana, itala kaj nederlanda; kun informoj pri la prononcado de la lingvoj. Prezo: 90,00 gld.



Interlingvistiko, esperantologio, komp./red. Violin Oljanov (1920). Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 251p. Mimeo. 20cm. Kolekto de 26 artikoloj de i.a. konataj esperantologoj. Prezo: 15,30 gld.

Iom pri rompumatadoj, J. Novák kaj I. Špička. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1985. 111p. Ilus. Mimeo. 21cm. Gvidilo pri la sindefendaj movoj "rompumoj". Prezo: 5,40 gld.

Izbrannoe, Vasilij Eroŝenko (1890-1952). Red. R. Belousov. El Esperanto, la japana, rusa kaj ĉina en la rusan trad. diversaj. Moskvo: Nauka, 1977. 263p. Ilus. 21cm. Bind. Elektro de

rakontoj, poemoj, artikoloj, skizoj kaj leteroj, kun rememoroj pri Eroŝenko i.a. de Lusin (Lü Xin) kaj Hujucz (Hu Yuzhi). Ĉio en la rusa lingvo. Prezo: 18,00 gld.

Kalevala (1835), kolektita de Elias Lönnrot (1802-1884). El la finna trad. (1964) Johannes Edv. Leppäkoski (1901-1984). Helsinko: Esperanto-Asocio de Finnlando, 1985 (2a eld.). 392p. Ilus. de Akseli Gallen-Kallela. 22cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento, n-ro 4. ISBN 951 9005 51 X. La fama finna nacia epopeo, brile tradukita. Unu el la ĉefverkoj de Eŭropo, kies karakteriza ritmo multe influis poetojn en plej diversaj landoj. La traduko estas formfidela eĉ ĝis la aliteracioj, kaj legiĝas kvazaŭ bona romano. Prezo: 88,50 gld.



Perkomputila tekstoprilaboro, red. Ilona Koutny. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1985. 336p. Ilus. 22cm. ISBN 963 571 147 6. Dudek unu studoj pri aktualaj aspektoj de la aŭtomata tekstoprilaboro, verkitaj de eminentaj fakuloj; kun ampleksa bibliografio, biografiaj notoj kaj dek paĝoj de resumoj en la angla kaj rusa. Prezo: 30,00 gld.

Resonoj / Nachklänge, Hubert Weinzierl (1935). El la germana trad. Eckhard Bick (1958). Munkeno: Natur und Umwelt, 1985 (eldonjaro mankas). 63p. Kolorfotoj de H. kaj B. Weinzierl. 22cm. Bind. Dulingva: Esperanto-germana. ISBN 3 924749 05 1. Poemaro pri la naturo kaj medio; profesie produktita. Prezo: 25,80 gld.

Tero de la homoj (1939), A. de Saint-Exupéry (1900-1944). El la franca trad. Henri Vatré (1908). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 152p. 21cm. Jubilea Eldonserio 2: Beletro tradukita 2. Romano pri la amikeco inter homoj. Prezo: 45,00 gld.

Tiaj ni estas, Sándor J. Bakó. Los-Anĝeleso: Al-Ba, 1965. 252p. Ilus. 18cm. Amuz-satira novelaro. Prezo: 13,50 gld.

Unua perbraka blokado / Prvá přídrž, J. Novák kaj I. Špička. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1984. 41p. Ilus. Mimeo. 21cm. Dulingva: Esperanto-ĉeĥa. Gvidilo pri la sindefenda movo "ango". Prezo: 5,40 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Aŭstrio:** La 14an de decembro fondiĝis en Vieno "Aŭstria Laborkomitato – Esperanto 100-jara" kiel leĝe registrita societo (adreso: Postfach 92, A-1183 Wien). En la komitato kunlaboras Aŭstria Esperantista Federacio, Aŭstria Esperanto-Junularo, Aŭstria Esperanto-Movado kaj Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista, sub la prezido de d-ro Hans Maitzen.

● **Britio:** Pasintan decembron kelkaj lokaj Esperanto-grupoj en Britio, i.a. tiuj de Gwynedd, Nottingham kaj Rhyl, protestis kontraŭ la decido de Britio eksigi el Unesko. Ili skribis al siaj parlamentanoj por esprimi profundan bedaŭron.

● **Eŭropo:** La nova adreso de Eŭropa Esperanto-Centro estas: rue d'Écosse 73, B-1060 Bruselo, Belgio.

● **FR Germanio:** Por la jarraporto de la delegitoj de UEA en FR Germanio ĝis la 11a de decembro respondis al la ĉefdelegito, s-ino Elisabeth Hirsch, 55% de la tiulandaj delegitoj. Ili dum la jaro i.a. respondis 3 164 leterojn, ricevis vizitojn de 1 084 eksterlandanoj, mem dumvojaĝe uzis la delegitan reton 110-foje, verkis 307 informajn artikolojn kaj komencis 48 kursojn. Kelkaj delegitoj kritikis la malfruan aperon de la Jarlibro de UEA, kiu laŭ ili devus aperi en aprilo aŭ majo, kaj bedaŭris la malaperon de ĝiaj mapoj.

● **Reunio:** Dum la pasinta studjaro deko da gejunuloj en mezlernejo de la u. Tampon lernis Esperanton en komencanta kaj progresanta klasoj. Informa kampanjo kun ekspozicio varbis 17 gelernantojn por nova ĉi-jara kurso, dum ses personoj daŭrigas kiel progresantoj.

● **Sovetunio:** Universitato P. Lumumba (Moskvo) aperigis la verkon *Direktoj de la nuntempa interlingvistiko* de d-ro S. Kuznecov en 500 ekzempleroj. En la eldonplano de la universitato por 1986 troviĝas ankaŭ *Teoriaj bazoj de la interlingvistiko*, publikigota en 10 mil ekzempleroj, de la sama aŭtoro. La eldonejo Nauka (Scienco) eldonos de la konata soveta lingvosciencisto N. Juŝmanov (1896-1946) *Elektitaj verkoj pri lingvoscienco: Problemoj de kosmolingvistiko*

en 5 mil ekzempleroj, kun enkonduko de S. Kuznecov. Ĉiuj ĉi libroj aperos en la rusa lingvo.

● Ĉe la estona eldonejo Eesti Raamat (Tallinn) aperis la dua eldono de *Esperanto keele õpik* (Lernolibro de la lingvo Esperanto) de Jaan Ojalo en 25 mil ekzempleroj. Ĝi estas por uzado en lernejoj kaj havas ampleksan Esperanto-estonan vortaron, kiu dume mankis.

● **Usono:** La usona Esperanto-fondaĵo Esperantic Studies Foundation (6451 Barnaby St. N.W., Washington, DC 20015) anoncis, ke ĝi aljuĝos vojaĝsubvenciojn por ebligi al tri observantoj kun rilataj scioj kaj senantaŭjuĝa kritikemo partopreni la 71an Universalan Kongreson en Pekino.

Foto

● **Informiloj:** Itala Esperanto-Federacio (IEF) ĵus eldonis grandformatan dupaĝan informilon, *Che sono cent'anni per una lingua?* (Kio estas cent jaroj por lingvo?), kun multaj nigra-blankaj fotoj. La informilo notendas ankaŭ de alilandaj Esperanto-aktivuloj, ĉar eblas mendi de IEF (Via Villorosi 38, I-20143

Milano, Italio) la porofsetan enpaĝigaĵon kaj anstataŭigi la italan per propralingva teksto.

● **Interlingvistiko:** La konata brita eldonejo Basil Blackwell (Oksfordo) pasintjare eldonis la 240-paĝan *The Artificial Language Movement* (La artlingva movado) de Andrew Large. Ĝi traktas la planlingvojn tiel en la teorio kiel en la praktiko surbaze de ampleksa dokumentaro kaj konstatas, ke Esperanto pruvis sian uzeblecon en ĉiuj vivosferoj, sed konkludas, ke la plej verŝajna mondlingvo estos la angla.

● **Monumentoj:** En la pasinta jaro (p.78 kaj 124) ni raportis pri la statistikado de monumentoj, stratoj, placoj kaj similaj objektoj, oficiale nomitaj laŭ "Esperanto" aŭ "Zamenhof". Tiam 462 tiaj objektoj estis registritaj. Pro alvenintaj informoj tiu nombro, ĝis la 30a de novembro 1985, kreskis al 553 en 33 landoj de ĉiuj kontinentoj. Kompare kun la stato antaŭ 20 jaroj (laŭ CED-dokumento de 1964), tiu kresko atingas 133%-ojn, inkluzivante la asteroidojn "Esperanto" kaj "Zamenhof", kiuj rondiras la sunon inter la orbitoj de Marso kaj Jupitero. La listo de tiuj nomigoj ankoraŭ haveblas de s-ro Hugo Röllinger (Theresienstr. 23, D-873 Bad Kissingen, FR Germanio) kontraŭ kvin irpk.

● **Unuigintaj Nacioj:** Kiel neregistara organizaĵo (NRO), UEA havas ligojn ne



● **Brazilo:** Vivaldo da Silva el Campos trovis manieron eltiri maksimuman profiton el la afiŝoj pri la universalaj kongresoj. Li skribis al Banko de Brazilo, informante pri la okazigo de la UK en Aŭgsburgo kaj petante permeson elmeti la afiŝon por semajno en ties loka publika oficejo. Poste konsentis pluraj aliaj bankoj, tiel ke unu sola afiŝo migris de banko al banko, atentigante pri la Internacia Lingvo.



● **Italio:** Debatas la eŭropan lingvo-problemon i.a. eŭropa parlamentano Sergio Ercini (plej dekstre), reprezentanto de la Kristandemokratia Partio, kaj d-ro G. Ferrari (plej maldekstre), reprezentanto de la Itala Liberala Partio, en aranĝo fine de la pasinta jaro, organizita de la roma sekcio de Eŭropa Asocio de Fervojistoj.

nur kun Unesko, sed ankaŭ kun Unuiĝintaj Nacioj ĉe ĝia Ekonomia kaj Socia Konsilio, konata per la mallongigo Ekosok. El la tiel lititaj 760 neregistraj organizaĵoj UEA estis inter tiuj en Listo C pro "merito de sia konsulta stato kun aliaj UN-organoj aŭ la fakaj institucioj". Post elpaŝoj de la Novjorka Oficejo de la Asocio UEA nun troviĝas en Listo A (la plej gravaj 491 organizaĵoj) pro "merito de agado prenita de Ekosok".


● **Radio:** En 1984 dek stacioj en naŭ landoj disaŭdigis 4 400 Esperantajn elsendojn, kiuj daŭris 1 899 horojn, sed dum 1985 dek du stacioj en same multe da landoj disaŭdigis entute 4 968 elsendojn dum 1 994 horoj. Tio estas por almenaŭ la kvara sinsekva jaro nova rekordo pri radio-programoj en la Internacia Lingvo. La pasintjara nombro kreskis pro la novaj elsendoj de Svisa Radio Internacia (Berno), direktitaj al Azio, Afriko kaj Ameriko. Ili komenciĝis la 6an de majo, kaj per siaj 837 elsendoj dum 139,3 horoj tiu stacio jam kaptis la trian lokon en la statistiko post Varsovio (2 196 elsendoj dum 976 horoj) kaj Pekino (1 464 dum 732 horoj). Aperis ankaŭ du novaj stacioj, Budapeŝto kaj Verona, kvankam ili estas aŭdeblaj nur en malvasta areo.

● La Esperanto-Sekcio de Radio Pekino anoncis, ke de la 8a de januaro ĝi disaŭdigas kurson de la ĉina lingvo. Ĝi estas elsendata unu fojon semajne kun ripeto en la sekva tago.

● **Tendumado:** Vigligi informan agadon sur la tereno de la kampado kaj pli ofte renkontigi esperantistajn tendu-

mantojn deziras s-ro P.J. van Duijne, p/a Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

● **Terminologio:** Funkcias en Varsovio Organizaĵo Internacia por la Unuecigo de Neologismoj Terminologiaj (OIUNT), kiu laboras sur la kampo de scienco kaj tekniko. Ĝi preparas terminologiajn kartojn kun difinoj en 58 lingvoj, inter kiuj estas Esperanto kaj Interlingua.



JOHN FUTRAN de Novjorko, Usono, mortis en novembro. Li estis dumviva membro kaj malavara apoganto de la Novjorka Oficejo de UEA.

HANS P. JESPERSEN (1906-1985) forpasis en Herning, Danlando, kie li estis la delegito.

LJUBA KNJAŽINSKAJA-LAPENNA (1909-1985) forpasis en Londono la 8an de novembro. Ŝi naskiĝis en Siberio (de pola/rusa gepatroj), kiel infano elmigris al Jugoslavio, por poste iri tra Parizo al Londono, kie ŝi vivis de post 1950. Ŝi lernis Esperanton antaŭ pli ol 35 jaroj kaj tra la tuta posta periodo sekretariis al sia edzo, prof. d-ro Ivo Lapenna. Tiurilate ŝi estis parttempa oficisto de UEA de 1952 ĝis 1974, plenumante laborojn unuavice por CED, sed ankaŭ por la diversaj aliaj movadaj okupoj de prof. Lapenna. Ŝi estis unu el tiuj personecoj, pri kiuj ne restas multaj spuroj en la movado, malgraŭ la fakto, ke ŝi dediĉis

Personoj

● **Luin:** Ĉiun trian jaron Stokholma Pac-Asocio aljuĝas premion por porpaca laboro pere de internacia lingvo. Tiu premio por 1985 estis la 16an de decembro transdonita al ges-roj Ulla kaj Franko Luin el Tyresö (Svedio) pro ilia multjara laboro por Esperanto. Josefina Larsson (m.1939), laŭ kiu la premio estas nomata, estis ordinara persono, kiu severe ŝparis por starigi la kapitalon. Ŝi siatempe estis la dommastrumisto de Alfred Nobel, fondinto de la mondfamaj Nobel-premioj.

● **Rosbach:** Johan Hammond Rosbach havis en 1984 grandan sukceson kun sia libro *Levende ord* (Vivantaj vortoj; vd. *Esperanto*, p.120/85). La sama eldonejo, Aventura (Arabiens gate 7, N-0253 Oslo 2, Norvegio), pasintjare eldonis plian lian libron, *Når begynte det?* (Kiam komenciĝis?), esence traduko de *Depuis quand* de Pierre Germa, sed artikolojn interesajn precipe nur por francoj anstataŭas artikoloj interesaj por skandinavo. Rosbach vastigis la tekston pri Esperanto kaj aldonis ĝeneralan artikolon pri internaciaj lingvoj. Ĉi tiu libro aperis en dek mil ekzempleroj.

Nekrologoj

al ĝi duonon de sia vivo kaj faris grandegan kvanton da utila kaj kompetenta laboro.

WILHELM MATTHEY mortis antaŭ nelonge en St. Blaise, Svislando. Li estis dumviva membro de UEA.

RIGMOR PEDERSEN (1910-1985) mortis en Silkeborg, Danlando, kie ŝi estis la delegito.

MICA (MARIJA) PETRIĆ (1903-1985) mortis antaŭ nelonge en Jugoslavio. Ŝi lernis Esperanton en 1921. En 1963 aperis ŝia vortaro por slovenlingvanoj *Slovensko-esperantski slovar*.

J.J. SCHOUTEN forpasis la 8an de novembro en Haarlem, Nederlando. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

HANS SIEGRIST mortis antaŭ nelonge en Schüpfheim, Svislando. Li estis dumviva membro de UEA.

La redakcio deziras atentigi organizantojn, ke ĝi neniam garantias senpagan aperigon de tekstoj pri okazontaj renkontiĝoj ks.

Por la tarifo de **pagitaj anoncoj** bonvolu vidi la duan kovrilan paĝon. Anonceto kostas po 0,90 gld. por ĉiu vorto.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Binditaj jarkolektoj de *El popola Ĉinio* (1983 kaj '84) aĉetebblas de Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, kontraŭ 37,50 gld. por kolekto (en Nederlando 39,40).

Kurzo de la stelo. En la 1a, 2a, 3a kaj 4a kvaronjaroj de 1986 unu stelo egalvaloros al respektive 0,97, 0,98, 0,99 kaj 1,00 nederlanda guldeno. Universala Ligo, Vosseveldlaan 16, NL-3768 GM Soest, Nederlando. Anoncu prezojn kaj kotizojn en valorstabilaj steloj!

Deziras korespondi, kolekti poŝtmarkojn kaj Esperanto-gazetojn 28-jara instruistino: Li Xiaohong, Bingtuan Nong Jiushi Zhongxue, Xinjiang Shengchan Jianshe, Xinjiang, Ĉinio.

Korespondvesperon organizos la 30an de aprilo la Esperanto-klubo de Neubrandenburg, kiu bonvenigos bildkartojn el la tuta mondo: S-ro Bent Griebel, H.-Just-Str. 13, DDR-2000 Neubrandenburg, Germana DR.

Diversaĝaj gekursanoj deziras korespondi tutmonde. Asociación Esperanto, Santa Fe 955, RA-2000 Rosario, Argentino.

Hola gesamideanoj! Se por vi Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo kaj „nova sento”, tiam skribu al: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Ni havas ion interesan por vi!

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Soleca longpuna malliberulo (brita, 25-jara) serĉas junulinon por korespondado kaj amikeco. Nacieco, kulturo ktp. negravaj. Bonvolu skribi al s-ro Dave L., D-Wing, Kingston Prison, Portsmouth, Britujo.

Vendisto en Togo deziras importi ferproduktojn, aŭtojn, traktorojn, tekstilaĵojn, ŝuojn, nutraĵojn, papervarojn, servojn de vojaĝ- kaj transportagentejoj. Proponu viajn produktojn kaj vendkondiĉojn al: Agbemadon-Attigbe B. Mensah, CEG de Zalivé, B.P.134, Aného, Togo.

Tra Mongolio per transsiberia trajno al la 71a UK (Pekino) vojaĝantaj homoj vizitu min, kiu buŝtradukiste helpos: Ts. Batzaya, Poste restante, GPO, Ulan-Bator 13, Mongolio (kvartalo XII-I,

loĝdomo XXVII, enirejo IV, etaĝo II, loĝanton-ro 49; telefono 51505).

Posedantoj de mikrokomputoroj ZX Spectrum, TK 90X, TS 2068 kaj akordaj bonvolu kontakti min. Internacia mikroklubo fondota. Perkomputora Esperanto-kurso kaj ĝenerala Esperanto-softvaro (programaro) baldaŭ haveblaj. Pablo León, C.C. 114, Suc. 53 (B), RA-1453 Buenos Aires, Argentino.

Deziras korespondi 17-jara lernanto: Hossein Doroodi, Pelak-e 25, Kuy-e Alavi, Khyaban-e Buali Sina, Khyaban-e Istgah, Qom, Irano.

D-ro Wim de Smet el Kalmthout, Belgio, komunikas sian novan adreson: W. de Smet, Prof. zoologie, Univ. Nat. Rwanda, B.P.117, Butare, Ruando.

Interŝanĝas poŝtmarkojn kontraŭ polaj filatelaĵoj ks. Kooperativo Filatelo, ul. Słowacka 23-m.h., PL-65-001 Zielona Góra, Pollando.

24-jara lernantino deziras korespondi: Afsane Kamani, Anvari 21, Khomeini Ave., Tabriz, Irano.



SYNTACTIC TREE STRUCTURES IN DLT

de Klaus Schubert

Sintaksa analizo de la pontolingvo de DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado), kiu estas bazita sur Esperanto.

La anglalingva studo priskribas arbografikaĵojn, kiuj estas formala vida reprezento de gramatikaj faktoj kaj konvencioj: rezulto el klara kaj detala sintaksa teorio pri Esperanto.

Kun difinoj kaj ekzemploj, ĝi klarigas la kombinadon de arbostrukturoj (parsadon), skizas ilian ligadon al font- kaj cellingvaj arbostrukturoj kaj traktas sintaksan strukturon kaj ties ŝanĝiĝon dum tradukado.

Kun sekcioj pri venontaj studoj kaj eventualaj diskuttemoj kun la lingvistika publiko.

Eld. BS0/Research, Utrecht, 1986. 211p., 30cm. ISBN 90 70730 02 2. Speciala prezo por la Esperanto-movado: 66,00 gld. plus sendokostoj (la normala ekstermovada prezo estas 105 gld.). Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.50m (15385 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 30.43m (9860 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

17.30-17.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

21.30-21.40 Verono, 185m (1621 kHz) kaj M.F. 100.5 MHz, 100.8 MHz. Radio International, Via P. Palio 36, I-37100 Verona, Italio.

MERKREDE

01.45-01.55 Berno, 48.90 (6135 kHz), 31.17m (9625 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

03.45-03.55 Berno, 48.90 (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz).

10.45-10.55 Berno, 31.04m (9665 kHz), 30.40m (9870 kHz), 25.43m (11795 kHz), 19.27m (15570 kHz).

13.15-13.25 Berno, 30.40m (9870 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.20m (11905

kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.27m (15570 kHz).

15.15-15.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.34m (11840 kHz), 25.14m (11935 kHz), 19.44m (15430 kHz).

17.15-17.25 Berno, 31.46m (9535 kHz), 31.28m (9590 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 24.93m (12035 kHz).

22.00-22.10 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 24.93m (12035 kHz).

22.45-22.55 Berno, 50.29m (5965 kHz), 31.17m (9625 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

ĴAŬDE

06.00-06.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz), 19.84m (15120 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

17.30-17.40 Berno, kiel lunde.

21.30-21.40 Verono, kiel lunde.

SABATE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, Rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

17.30-17.40 Berno, kiel lunde.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.

Berno, kiel merkrede.

DIMANĈE

05.40-05.52 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 25.16m (11925 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.45-09.57 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 41.84m (7170 kHz).

12.05-12.10 Budapeŝto, M.F. 67.04 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

20.00-20.10 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 86.5 MHz. (ankaŭ je festotagoj).

22.00-22.15 Rio-de-Janeiro, 214m (1400 kHz). Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.


22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

ĜENERALAJ INFORMOJ

a) Direktitaj ondoj. **Berno**: je la 01.45h al Centra kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.45h al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45 kaj 10.45h al Malproksima Oriento; je la 13.15h al Oriento; je la 15.15h al Proksima Oriento; je la 17.15 kaj 22.00h al Arabio kaj Afriko; je la 22.45h al Suda Ameriko. **Pekino**: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz je la 20.00h al Afriko. **Vieno**: 11925 kHz al Proksima Oriento; 6155 kHz al okcidenta Nord-Ameriko.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo**.

c) Nur loka aŭskultebleco por **Budapeŝto** (ankaŭ en eksterlandaj apudlimaj regionoj), **Rio-de-Janeiro, Sorocaba, Verono** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (MF).



Aŭskultu kaj reagu

Dum 1985 okazis 4 968 Esperantaj radioelsendoj, kiuj daŭris 1 994 horojn. Tio signifas, ke oni ĉiutage povas aŭskulti Esperanton per radio dum preskaŭ kvin kaj duona horoj. Ĉiuj detaloj troviĝas en la ĉi-supra tabelo. Konsciu, ke tiuj elsendoj dependas de sia populareco ĉe la aŭskultantoj, do **skribu foje al radio-stacio!**

Perkomputila tekstoprilaboro



Aperis ĵus la plej ampleksa projekto de Sciencia Eldona Centro: 336-paĝa libro pri tekstoprilaborado komputila. Ĝi prezentas 21 studojn pri aktualaj aspektoj de la aŭtomata tekstoprilaboro, verkitaj de eminentaj fakuloj el Ĉinio (Ouyang), Francio (Janot-Giorgetti k.a.), FR Germanio (Maas), Germana DR (Meier k.a.), Hispanio (de Sopeña), Hungario (Gordos k.a.), Japanio (Niŝida), Nederlando (Witkam, de Kat), Pollando (Jassem k.a.) kaj Usono (Sherwood). La artikoloj estas ordigitaj laŭ kvar sekcioj: Parol-prilaboro, Aŭtomata lingvo-analizo, Perkomputila tradukado kaj Komunikado inter homo kaj maŝino.

Perkomputila tekstoprilaboro, redaktis Ilona Koutny. Budapeŝto: Sciencia Eldona Centro, 1985. 336p. 22cm. Ilus. ISBN 963 571 147 6. Kun ampleksa bibliografio, biografiaj notoj pri la aŭtoroj kaj 10 paĝoj de resumo en la angla kaj rusa. Prezo: 30,00 gld. plus sendokostoj. Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume 3 ekzempleroj.

ESPERANTO 1887-1987

En 1987 ni festos la 100-jariĝon de la ekzisto de Esperanto. Ekde nun vi jam povas aĉeti: **Gluetikedojn Esperanto 1887-1987**: Orkolore presitajn; uzeblajn korespondaĵoj. Prezo de 100 gluetikedoj: 200 BF.

Unŝirmilon Esperanto 1887-1987: Blanka preso sur verda fono. 10x130cm. (por aŭto). Prezo: 250 BF.

Ŝlosilringon Esperanto 1887-1987: Orkolore presitan. Haveblan en diversaj koloroj: blua/nigra, flava/ruĝa/blanka kaj verda. Prezo: 100 BF.

La sendokostoj estas inkluzivitaj. Bonvolu pagi al nia poŝtĝira konto: (Bruselo) 000-0152140-44 de Eldonejo & Librejo **Sonorilo**, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio, kun mencio de tio, kion vi elektis. Antaŭdankon pro via mendo.

ELIZA KEHLET petas, ke oni bonvolu noti ŝian novan adreson:

Alfons Servaislei 18, B-2120 Schoten, Belgio.

☎ (03) 658 45 01



Koresponda
Servo
Mondskala
de UEA

Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121 bis, BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO


De 66 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, librecenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, krucvortenigmoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 13,00 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA (37 guldenoj; por Nederlando 38,85 gld.)

Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez n-ro 28, 6° A, E-28036 Madrid 16, Hispanujo
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska



Ĵus aperis

Amo kaj morto en Balio de Vicki Baum

Verko pri la aŭtentika tradicia vivo de la balianoj kaj ties moroj. En la formo de romano, ĝi rakontas pri homaj sortoj dum historiaj okazaĵoj ĉirkaŭ la renkontiĝo kun la nederlanda kolonia potenco en la pasinta jarcento.

Kun kovrilo speciale desegnita de Peter Oliver.

Amo kaj morto en Balio (1937) de Vicki Baum (1888-1960). La germana tradukis P.H. Mooij. Roterdamo: UEA, 1986. 420p. Formato A5. ISBN 92 9017 033 6. Prezo: 28,50 gld. plus sendokostoj. Mendu de Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj al la sama adreso.)

SENNACIULO

Ĉu vi konas ĝin?
Monata organo de SAT

– *Laborista esperantismo – Kontraŭ rasismo*
– *Kontraŭ faŝismo – Por la homaj rajtoj – Eŝo de sociaj luktoj – Donas la parolon al ĉiuj laboristaj tendencoj...*

Proveksemplero kun abontarifo havebla kontraŭ internacia respondkuponono ĉe:
SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris

ACTA INTERLINGUISTICA

**Scienca interlingvistika simpozio
prelegaro de**

V. Barandovska, M. Duc Goninaz, B. Golden, A. Golonka, B. Jędrzejczyk-Rokicka, Z. Kornicki, J. Leyk, F. Lo Jacomo, S. Revesz, R. Rokicki, G. Silber, F. Simmonet, T. Tyblewski kaj B. Wach a prezentitaj dum

**la 11a Scienca Interlingvistika Simpozio,
okazigita en Varsovio en 1983.**

Red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1984. 160p. 21cm. Prezo: 18,00 gld. (plus sendokostoj). Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.




Diskriminacio

prelegoj kaj komentarioj

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturan diskriminacion. *Diskriminacio* diskutigas ankaŭ pri aliaj diskriminacioj kaj donas proponojn por agado i.a. en klubvesperoj.

Diskriminacio traktas ★ la radikojn de diskriminacio ★ diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj ★ internacian ekonomian diskriminacion ★ diskriminacion kontraŭ virinoj ★ diskriminacion pro seksa orientiĝo ★ diskriminacion pro religio ★ maldiskriminacion kaj ★ lingvan diskriminacion.

Diskriminacio; Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto, red. Renato Corsetti. Rotterdam: UEA, 1984. 175p. 21cm. ISBN 92 9017 031 X. Prezo: 21,00 gld.



Ĵus aperis

Amo kaj morto en Balio

de Vicki Baum

Verko pri la aŭtentika tradicia vivo de la balianoj kaj ties moroj. En la formo de romano, ĝi rakontas pri homaj sortoj dum historiaj okazaĵoj ĉirkaŭ la renkontiĝo kun la nederlanda kolonia potenco en la pasinta jarcento.

Kun kovrilo speciale desegnita de Peter Oliver.

Amo kaj morto en Balio (1937) de Vicki Baum (1888-1960). El la germana tradukis P.H. Mooij. Rotterdamo: UEA, 1986. 420p. Formato A5. ISBN 92 9017 033 6. Prezo: 28,50 gld. plus sendokostoj. Mendu de Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj al la sama adreso.)

SENNACIULO

Ĉu vi konas ĝin?
Monata organo de SAT

– *Laborista esperantismo* – *Kontraŭ rasismo*
– *Kontraŭ faŝismo* – *Por la homaj rajtoj* – *Eĥo de sociaj luktoj* – *Donas la parolon al ĉiuj laboristaj tendencoj...*

Proveksemplero kun abontarifo havebla kontraŭ internacia respondkupono ĉe:
SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris


ACTA INTERLINGUISTICA

**Scienca interlingvistika simpozio
prelegaro de**

V. Barandovska, M. Duc Goninaz, B. Golden, A. Golonka, B. Jędrzejczyk-Rokicka, Z. Kornicki, J. Leyk, F. Lo Jacomo, S. Revesz, R. Rokicki, G. Silber, F. Simmonet, T. Tyblewski kaj B. Wacha prezentitaj dum

**la 11a Scienca Interlingvistika Simpozio,
okazigita en Varsovio en 1983.**

Red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1984. 160p. 21cm. Prezo: 18,00 gld. (plus sendokostoj). Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Diskriminacio

prelegoj kaj komentarioj

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturan diskriminacion. *Diskriminacio* diskutigas ankaŭ pri aliaj diskriminacioj kaj donas proponojn por agado i.a. en klubvesperoj.

Diskriminacio traktas ★ la radikojn de diskriminacio ★ diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj ★ internacian ekonomian diskriminacion ★ diskriminacion kontraŭ virinoj ★ diskriminacion pro seksa orientiĝo ★ diskriminacion pro religio ★ maldiskriminacion kaj ★ lingvan diskriminacion.

Diskriminacio; Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto, red. Renato Corsetti. Rotterdam: UEA, 1984. 175p. 21cm. ISBN 92 9017 031 X. Prezo: 21,00 gld.